# EL POPOLA ĈINIO

中国报道

2

1974






Novaj studentinoj de agronomia instituto (*ĉinstila pentrajo*)

# Intima Zorgo, Sana Kresko

"Gejunuloj, ni bonvenigas vin al ni por kamparaniĝi!"





Maljuna kompartiano Li Ŝoŭfu de Ligiaĝaj-brigado de Gjunan-gubernio de Ŝandong-provinco rakontas al la intelektaj gejunuloj, kiel la popolo de Ligiaĝaj transformis la kalvajn montojn.

Maljuna kamparano instruas al intelekta junulino teknikon de kotonkulturado.





Komunumanoj de Kinglan-komunumo de Pinglu-gubernio de Ŝanhi-provinco donacas al intelektaj junuloj ŝuojn de ili mem faritajn kaj admonas ilin ĉiam konservi la naturon de laboranta popolo.

Laboristoj de la Ŝanhaja Traktora Fabriko instruas stiradon al la gejunuloj kiuj baldaŭ iros al kamparo por tie fiksloĝi.





Profesoro Ĝaŭ Hongĝang (meze) de la Nordokcidenta Agronomia Instituto de Ŝenhi-provinco venis al la vilaĝo, kie liaj filo kaj filino kamparaniĝis, por kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj direkti ilin en lernado de agrikultura tekniko.

La tria roto de iu trupo de la Pekina Trupo varme subtenas la kamparaniĝon de intelektaj gejunuloj. Jen ili donacas legomojn al intelektaj gejunuloj loĝantaj proksime de ilia garnizonejo.





Veterana kamparano kaj intelektaj gejunuloj kune resumas sperton de riĉa rikolto de tritiko.

Ekssoldato de la ruĝa armeo kaj revolucia kadro Hiaŭ Kjuande venis al kamparo por kuraĝigi sian kamparaniĝintan filinon diligente lerni kaj labori tutan vivon en la kamparo.





Maljuna mongola veterinaro instruas al intelekta junulo fiksloĝiĝinta sur la stepo pri kuracado al ĉevalo.

Vicsekretario (maldekstre) de la partia filio de Dongŝi-brigado de Ĝongŝan-gubernio de Guanghi esploras kreskadon de arakido kune kun intelektaj gejunuloj.



# Kial la ĉinaj intelektaj gejunuloj devas iri en la kamparon?

## GRANDA LERNEJO

Antaŭ kelkaj jaroj mezlerneja diplomitino Ĝang Ŝufen venis de urbo en la kamparon por kamparaniĝi. En la komenco kiam ŝi laboris en rizkampo, ŝi eĉ erare elradikis rizidojn anstataŭ fiherbojn. Sed nun ŝi jam posedas kompletan teknikon de rizkulturado kaj fariĝis labormodelo de Sujhua-gubernio de Hejlonggiang-provinco.

En la lastaj kvin jaroj ne dekoj aŭ centoj sed ok milionoj da intelektaj gejunuloj kiel Ĝang Ŝufen iris en la kamparon por fiksloĝado, inter kiuj ĉ. 2 milionoj venis de la tri grandaj urboj Pekino, Ŝanhajo kaj Tiangin. Tio estas nova afero aperinta en la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Kial tiuj ĉi gejunuloj iris fiksloĝiĝi en la kamparo?

En Ĉinio intelektaj gejunuloj devas kombini sin kun laboristoj kaj kamparanoj, tio estas revolucia vojo antaŭlonge montrita de Prezidanto Maŭ Zedong. En la Kontraŭjapana Rezistmilito, rompinte la blokadon de la kuomintangaj reakciuloj, miloj kaj miloj da intelektuloj kaj junaj lernantoj venis de urboj al la revolucia bazo Jan-an, kaj al la vasta kamparo post la malamikoj. Sub la gvido de la Komunista Partio ili militis kaj produktis kune kun la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj kaj faris kontribuon por gajni venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Demokratia Revolucio.

En la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado de nia lando ankaŭ multaj intelektaj gejunuloj iris en la kamparon aŭ revenis en siajn hejmvilaĝojn por kontribui sian forton al la konstruado de nova socialisma kamparo. En tio intelekta junulino Hing Janzi estas bona ekzemplo.

De sia infaneco ŝi vivadis en Tiangin ĉe siaj gepatroj. Post la edukado de la Partio ŝi decidis daŭrigi la gloran tradicion de la revoluciaj antaŭuloj kaj iri la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj sub la direktado de Prezidanto Maŭ Zedong. Kiam ŝi lernis en mezlernejo en 1958 ŝi firme petis permeson por hardi sin en la kamparo. Ŝi pensis, ke vivi fore de la gepatroj estas iom maloportune por knabino, kaj en la kamparo la vivo estas malpli komforta ol tiu en la urbego, tamen la malfaciloj povas pli bone hardi homojn. Tiel pensante ŝi decideme adiaŭis la gepatrojn kaj venis al iu vilaĝo de Baŭdi-gubernio de Hebej-provinco. Tie ŝi akiris riĉajn sciojn pri klasa batalo kaj produkta



*Hing Janzi* (la dekstra) *faras artan fekundigon de maizo kune kun membro de sia grupo de scienca eksperimento.*

batalo. Kune kun la komunumanoj ŝi transformis la malaltajn, facile inundeblajn salajn kaj alkalajn terpecojn en altproduktajn. Ŝi pasigis 15 jarojn en la kamparo kaj iom post iom maturiĝis kaj fariĝis eminenta daŭriganto de la revolucia afero de la proletaro.

La gejunuloj de la nova Ĉinio plejparte pasigis sian vivon en la nova socio. Precipe tiuj en la urboj konis nek la politikan kaj ekonomian staton de la kampara socio, nek la laboradon, vivon kaj penson de la kamparanoj. Ili akiris multajn sciojn el la libroj, tamen multaj el ili ne povis praktiki. Ke ili iru en la vastan mondon de la kamparo por sperti pluvojn kaj ventegojn, ke ili hardiĝu kaj kresku en klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, tio estas grava metodo por eduki kaj krei milionojn kaj milionojn da daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio de nia lando Prezidanto Maŭ faris la alvokon **"intelektaj gejunuloj iru al la kamparo kaj ricevu reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj"**, kaj responde al tio leviĝis tra la tuta lando la tajdo de kamparaniĝo de intelektaj gejunuloj.

En 1968, intelekta junulino Caj Ligian venis kun plena entuziasmo al Dugiaŝan de Ŝanhi-provinco por ricevi reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Komence ŝi rigardis ĉiujn en la vilaĝo kiel siajn edukantojn. Iu homo ŝajnigis sin tre zorganta pri ŝi kaj ŝi ne rimarkis lian fiintencon. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris al ŝi, ke en la vilaĝo ekzistas klasa batalo kaj tiu homo iras ne la saman vojon de la aliaj. Spertinte multajn okazaĵojn en la malgranda montvilaĝo Juna Caj vidis la veran vizaĝon de la fiulo kaj kune kun la amasoj malkovris kaj kritikis lian subfosadon al la produktado. La komunumanoj unuiĝis kaj levis novan altan tajdon en la produktado. La montvilaĝo fariĝis pli bela kaj Caj Ligian pli firma. La komunumanoj fidas ŝin kaj la partia organizo akceptis ŝian peton por partianiĝo kaj

elektis ŝin kiel sekretarion de la partia filio.

Miloj kaj miloj da intelektaj gejunuloj same kiel Hing Janzi kaj Caj Ligian maturiĝis dank' al la edukado de la Partio kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. La vasta mondo de la kamparo donis al ili abundajn nutraĵojn, tial ili diris: "Ankaŭ la kamparo estas granda lernejo kie estas nefinfareblaj aferoj kaj nefinlerneblaj scioj."

## AKTIVA ARMEO

En la lastaj jaroj, ĉie en la kamparo de Ĉinio oni povas aŭdi jenan ĝojan diron de la komunumanoj: "La konstruado de nova socialisma vilaĝo vere bezonas tiujn klerajn gejunulojn!"

Ĝang Danuan estas tre bonvena al la komunumanoj de Luodong-brigado de Guangdong-provinco. Antaŭe la loko estis malriĉa montvalo. Post la Liberiĝo kvankam multe ŝanĝiĝis la fizionomio de la vilaĝo, tamen la nivelo de mekanikigo estis ankoraŭ tre malalta. Mezlerneja diplomito Ĝang Danuan venis de la gubernia urbo al Luodong-brigado. La sekretario de la partia filio de la brigado rakontis al li la sangan historion de la komunumanoj en la malnova socio, montris al li la ŝanĝiĝon de la vilaĝo en la nova socio kaj la planon pri la perspektivo de la brigado. Ĝang Danuan estis forte emociita kaj decidis enradikiĝi en la montvilaĝo por ŝanĝi ĝian fizionomion kune kun la komunumanoj.

Post nelonge ĉi tie leviĝis la amasa movado de ekspluatado de montregiona akva riĉfonto. La partia filio asignis al li la taskon de projektado de hidroelektra stacio. Por Ĝang Danuan la tasko estis tre peniga. La partia filio konsilis, ke li lernu en farado kaj akumulu sperton en

*Intelektaj gejunuloj kaj teknikisto de Lingtoŭ-teokultivejo sur Hajnan-insulo de Guangdong-provinco kune faras esploron pri teaj fiinsektoj.*



praktikado. Sin apogante sur la amasoj, Ĝang Danuan diligente esploris kaj iris aliloken por lerni sperton de konstruado de hidroelektra stacio. Fine la vilaĝo sukcesis konstrui la unuan hidroelektran stacion en tiu montregiono. Post la konstruo de la unua, dua ... hidroelektraj stacioj, ĉi tie la pumpado, draŝado, grensenŝeligado estas farataj per elektro kaj la pohektara produktokvanto de greno kreskis de 4.5 tunoj ĝis 9.7 tunoj. En la nuna Luodong-brigado tage bruas la maŝinoj kaj nokte brilas en ĉiu domo elektraj lampoj.

Agrikulturo estas la bazo de la nacia ekonomio de nia lando. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la vastaj amasoj de kamparanoj iom post iom suriris la vojon de kolektivigo. Precipe ekde la amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo la produktado multe progresis. Tamen en la malnova socio la agrikulturo estis tre postiĝinta, tial por ĝisfunde ŝanĝi la fizionomion de la kamparo kaj modernigi la agrikulturon, bezonataj estas ne nur penema laboro de komunumanoj kaj subtenoj de diversaj flankoj de la tuta lando, sed ankaŭ multnombraj intelektaj gejunuloj kiel Ĝang Danuan kiuj aplikas la lernitajn sciojn en la kamparo por rapidigi la konstruadon de nova socialisma kamparo.

En la lastaj jaroj milionoj da intelektaj gejunuloj aktivas sur la agrikultura fronto. Ili aplikis la sciencajn sciojn lernitajn el la libroj en produktado kaj jam akiris en tio ĝojindajn sukcesojn. Ekzemple, en Ciligubernio de Hunan-provinco estas grupo de scienca eksperimentado "la 8-a de Marto" konsistanta el intelektaj junulinoj. Subtenate de la partia organizo ĝi disvolvis sciencajn eksperimentojn kaj gajnis tri sinsekvajn riĉajn rikoltojn de sensemigita kotono kun pohektara produktokvanto de 2,200 kg. Krom tio la junulinoj akiris sperton de alta produkto de kotono kaj per tio akcelis la kotonan produkton de la tuta gubernio.

Intelektaj gejunuloj starigis en la kamparo noktajn kursojn kaj artajn grupojn. Ili laboras kiel librotenistoj, agronomiaj teknikistoj, traktoristoj, instruistoj de mezlernejoj kaj elementaj lernejoj kaj nudpiedaj kuracistoj. En la lastaj jaroj la kamparaniĝintaj intelektaj gejunuloj demonstris per fakto ke ili estas aktiva armeo en la konstruado de nova socialisma kamparo.


## STARIGI NOVAN MORON

En 1968 Deng Jonghong, filino de Deng Hianghiong, kadro de la Fabriko de Kemiindustriaj Mekanikaĵoj de Ĉangŝa de Hunan-provinco volis iri en montregionon por tie kamparaniĝi. Ŝiaj gepatroj aprobis ŝian decidon. Sed ŝiaj geavoj ne konsentis opiniante ke por mezlerneja diplomito kamparaniĝo estas afero tro domaĝa.

Kelkaj homoj kiuj pensis same kiel ŝiaj geavoj esprimis bedaŭron, ke en la kamparo oni ne povas havi brilan estonton.

Kial iuj havas malsamajn opiniojn, se la kamparaniĝo de intelektaj gejunuloj havas gravan signifon?

Tiaj pensoj originis el antikveco. Antaŭ pli ol 2,000 jaroj en Ĉinio vivis reakcia pensulo Konfuceo, kiu klopodadis por konservi la sklavan sistemon. Li diris, ke "intelektuloj devas esti regantaj, dum laboruloj devas esti regataj", ke "eminentaj lernantoj fariĝas mandarenoj". En la pasintaj miloj da jaroj, por daŭrigi sian regadon la ĉinaj ekspluatantaj klasoj trompis kaj mistifis la laborantan popolon ankaŭ per tiaj pensoj kaj toksis multajn homojn. Kaj ankaŭ Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ k.s. burĝaj agentoj enŝteliĝintaj en la Kompartion heredis la doktrinon de Konfuceo kaj same kiel la antaŭaj regantoj, malestimis fizikan laboron, la kamparon kaj la kamparanojn. Ili energie distrumpetis la penson "lerni por poste fariĝi mandarenoj". Krome ili laŭeble kalumniis kaj subfosis la movadon de kamparaniĝo de intelektaj gejunuloj.



*Ŝanhaja intelekta junulo Ĝu Kegia fondis lernejon por hani-naciecaj infanoj kaj ricevis laŭdojn de tieaj popolanoj pro lia fervoro.*

Sed Deng Hianghiong, kadro edukita de la Kompartio, opiniis, ke en la nova Ĉinio laboranta popolo estas la mastro de la lando. La revoluciaj profesioj havas inter si ne diferencojn de nobleco kaj malnobleco, sed nur malsamecon en labordivido. La urboj subtenas la kamparon; la industrio helpas la agrikulturon; iom post iom redukti la diferencojn inter la urboj kaj kamparo, inter la laboristoj kaj kamparanoj, inter intelekta laboro kaj fizika laboro — jen la granda historia misio por la proletaro. Intelektaj gejunuloj iru en la kamparon por fariĝi kleraj kamparanoj de la patrio, tio estas revolucia ago celanta la efektivigon de tiu ĉi alta idealo, ĝuste kiel Marks montris en sia *La Komunista Manifesto*, **"necesigi plej radikalan rompon kun tradiciaj ideoj".**


Kune kun sia filino li persvadis la maljunulojn. Poste, Jonghong bone hardis sin en la kamparo, estis laŭdata de la amasoj kaj fariĝis membro de la Komunista Partio de Ĉinio. Tiam ŝiaj geavoj iom post iom ŝanĝis sian opinion.

En Ĉinio estas multaj gejunuloj kaj gepatroj kiuj agas kiel Deng Jonghong kaj ŝiaj gepatroj. Ankaŭ multaj gvidantaj kadroj de la Partio kaj ŝtato donis aktivan ekzemplon en sendo de siaj gefiloj al la kamparo. Ilia ago formis ruliĝantan revolucian torenton kaj draste frapadis la malnovajn pensojn kaj kutimojn en la miloj da jaroj malestimi kamparanojn kaj fizikajn laborojn, kaj starigis novan moron ami la kamparon kaj agrikulturan laboron.

## ZORGOJ DE DIVERSAJ FLANKOJ

La Komunista Partio de Ĉinio kaj la ŝtato kuraĝigas la gejunulojn iri en la kamparon por ke ili hardu sin en malfaciloj, kaj samtempe ĉiam zorgas ilian kreskadon en la kamparo.

La partiaj kaj registaraj organoj en la kamparo kun la gubernia kaj supergubernia nivelo starigis specialajn fakojn por direkti kaj kontroli tiun laboron kaj kolekti opiniojn kaj postulojn de la gejunuloj. Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj grandaj urboj speciale



*Intelektaj gejunuloj venintaj al Binhian-gubernio de Hejlonggiang-provinco elkulturis bonan specion de sojfabo kaj per tio altigis ĝian produktokvanton.*

sendis kadrojn por konduki la intelektajn gejunulojn en la kamparon. La ŝtato ĉiujare donis sumon da mono kaj kvanton da materialoj por konstrui loĝejojn, aĉeti agrikulturajn instrumentojn por la intelektaj gejunuloj. Oni ofte sendis delegitojn en la kamparon por vidi ilin.

En la lastaj jaroj oni eldonis multajn librojn pri laŭdindaj faroj de kamparaniĝintaj intelektaj gejunuloj. En 1973 Ŝanhajo eldonis meminstruan bibliotekon por gejunuloj inkluzivantan pli ol 20 flankojn de Marksisma-Leninisma teorio, historio, literaturo, naturaj sciencoj, agrikulturaj teknikoj k.a. Distribuaj branĉoj ĝustatempe sendis la librojn al la kamparaniĝintaj intelektaj gejunuloj.

Komunumanoj bonvenigas la intelektajn gejunulojn kiel siajn hejmenrevenantajn gefilojn. Ili diris: "Prezidanto Maŭ konfidis la gejunulojn al ni, ni nepre devas bone zorgi pri ili." Antaŭ ol gejunuloj venis en la vilaĝon, la komunumanoj jam pretigis loĝejojn kaj ĉiujn bezonaĵojn por laboro kaj ĉiutaga vivo, kaj la gejunuloj povis tuj komenci prepari manĝaĵojn aŭ eklabori en kampo. En iuj lokoj komunumanoj speciale kulturis legomojn por ke venontaj gejunuloj povu ricevi legomojn tuj post alveno. Iuj intelektaj gejunuloj ne kapablis prepari manĝaĵojn kaj tuj post ilia alveno al la kamparo maljunaj komunumanoj jam iris al ili por instrui tion al ili, tial la gejunuloj povis rapide mem zorgi sian vivon.

La komunumanoj pli multe zorgas pri ilia ideologia progreso. Gaŭ Zuhua venis de Ŝanhajo al iu komunumo de Gilin-provinco. La malkomforta vivo ŝancelis lin. Iu maljuna malriĉkamparano rimarkis tion kaj interbabilis kun li. La maljunulo rakontis al li pri sia amara vivo en la malnova socio: Li manĝis herbojn, loĝis en ĉevalstalo kaj laboregis ŝvitege kiel ŝarĝbruto. Li priparolis al li ankaŭ la firman decidon de la lokaj komunumanoj en reformado de la naturo kaj en la konstruado de nova kamparo. Lia parolo multe edukis Malgrandan Gaŭ. De tiam li ĉesis ŝanceliĝi. Li mo-

deste lernas de la komunumanoj, vivas mallukse kaj laboras entuziasme, tiel ke la amasoj alte laŭdis ilin.

Ankaŭ urbanoj tre zorgas pri la intelektaj gejunuloj irintaj en la kamparon. Iuj loĝkvartalaj komitatoj starigis rilatojn kun koncernaj produktaj brigadoj en la kamparo por scii la pensojn kaj la vivon de la gejunuloj. Kiam la gejunuloj revenis en urbojn por viziti siajn gepatrojn, la loĝkvartalaj komitatoj okazigis spertointerŝanĝajn kunsidojn kaj amuzajn vesperojn, organizis por la gejunuloj vizitadon al agrikultura ekspozicio.


## SANA KRESKADO


Post plurjara lernado kaj hardado en la granda lernejo de kamparo la gejunuloj iom post iom maturiĝas.

Ĝu Kegia estas elstara ekzemplo. En 1968, kiam li estis 17-jara junulo, li venis de Ŝanhajo al iu malproksima montvilaĝo de Hiŝuangbanna de Junnan-provinco. Li decidis akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la frataj nacimalplimultoj kaj kontribui sian forton al la konstruado de nova montvilaĝo. Tie li klopodis por plenumi sian ĵuron. Kion la amasoj bezonas, tion li diligente lernas kaj aktive faras. Li jam ellernis la buŝajn kaj skribajn lingvojn de daj- kaj hani-naciecoj. En la montvilaĝo ne estis instruisto, li do mem establis lernejon kaj kulturis instruistojn; antaŭe la virinoj devis pisti rizon ĝis profunda nokto, li do faris por ili senŝeligan maŝinon; komunumanoj delonge jam deziris konstrui hidroelektran stacion, li do tenis tion en sia koro kaj kiam li revenis al Ŝanhajo por viziti siajn gepatrojn li ĉiutage klopodis por kolekti materialojn kaj lerni elektristajn teknikojn. Kiam li revenis al la montvilaĝo, li prospektoradis post laboro. Fine li kaj la komunumanoj sukcesis konstrui la hidroelektran stacion. La komunumanoj laŭdis lin kiel "la plej okupatan junulon en la montvilaĝo". En la kelkaj jaroj post la alveno al la montvilaĝo li jam kunfandiĝis kun la popolo kaj fariĝis nedisigebla disde la popolo. Kiam la partia organizo kaj la komunumanoj volis sendi lin viziti universitaton, li fordankis: "Mi ne povas disiĝi de vi kaj la montvilaĝo."

En la vasta kamparo, por gejunuloj estas multaj scioj neniel akireblaj en lernejoj. Dank' al helpo de komunumanoj multaj gejunuloj faris inventon kaj kreon en scienca eksperimentado. La intelekta junulo Ĉeng Joŭĝi de Hebej-provinco elektis kaj enkondukis pli ol 70 bonajn speciojn de plantaĵoj, tiel ke multiĝis la produktokvanto de maizo kaj sorgo de lia brigado. Li jam

*Intelektaj gejunuloj de la Hongki-kultivejo de Hubej-provinco kolektas lotusajn fruktojn.*





*Intelektaj gejunuloj de Ŝanhe-kultivejo post studado en la postlabora lernejo*

fariĝis kamparano-specialisto kompetenta por scienca esplora temo asignita de la ŝtato. Intelektaj gejunuloj kamparaniĝintaj en Hejlonggiang-provinco diligente lernis sciencajn sciojn kaj elkulturis bonan specion de sojfabo kiu donas pli ol 3,000 kg. da sojfaboj po hektaro.

En la kamparo la intelektaj gejunuloj studis en la klasa batalo Marksismon-Leninismon kaj Maŭzedongpenson kaj multe altigis sian konscion pri la klasa batalo kaj la batalo inter la du linioj, kaj en ili aperis multe da novaj homoj kun komunisma konscio. El la kamparaniĝintaj intelektaj gejunuloj de la tuta lando preskaŭ 60,000 glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, pli ol 830,000 aliĝis al la Komunisma Junulara Ligo kaj pli ol 240,000 estis elektitaj kiel gvidaj funkciuloj de diversaj niveloj de provinco, subprovinco, gubernio, komunumo kaj brigado.

Reprezentantoj de kamparaniĝintaj intelektaj gejunuloj glore ĉeestis la Dekan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio okazintan en 1973. Hing Janzi kaj Ĝu Kegia estis elektitaj respektive kiel membro kaj kandidata membro de la Centra Komitato de la Partio.

La pluvo kaj la sunradio de la vasta mondo de la kamparo nutras la novan generacion. La junuloj beligas la patrion kune kun la vastaj amasoj de komunumanoj per kreiva laborado.

# La scienca kaj teknika grupo de junuloj en Hehengĉeng-brigado

EN Hehengĉeng-brigado de Hebej-provinco estas scienca kaj teknika grupo konsistanta el viglecplenaj junuloj. Ili diligente kaj peneme faris sciencajn eksperimentojn pri terkulturado kaj multe kontribuis por alta produkto de greno kaj kotono.

## I

En printempo de 1964, Li Heguj, sekretario de la partia filio revenis post la vizito al Daĝaj kaj emocie diris al aliaj: "En la malfacila montregiono komunumanoj de Daĝaj faris grandan kontribuon al la ŝtato, tamen ni loĝas sur la ebenaĵo kaj eĉ ne povas nin provizi per greno, por ne paroli pri subteno al la konstruado de la ŝtato." Liaj vortoj forte ekscitis la junulojn. Tiunokte ili sidis ronde, multe diskutadis kaj fine decidis fari grandan kontribuon al konstruado de la nova socialisma kamparo.

Komence de 1965, subtenate de la partia filio Li Mingŝan kaj kelkaj aliaj intelektaj junuloj sin organizis en sciencan kaj teknikan grupon. Ili decidis fari sciencan eksperimentadon pri terkulturado por altigi produkton de greno.

*Komunumanoj sarkas en kolzkampo.*



Post la fondiĝo de la grupo la junuloj pririgardis avangardajn brigadojn por lerni kaj vizitis veteranajn malriĉkamparanojn de sia brigado. Ili serioze resumis spertojn de la malnova generacio kaj modeste esploris novajn sciencajn metodojn en terkulturado. Foje, Li Mingŝan, membro de la komunisma Junulara Ligo kaj agronomia teknikisto de la brigado, vizitis la maljunan malriĉkamparanon Vang Fenglin. La lasta rakontis al li, kiel li antaŭe faris miksitan kulturadon de malsamsezone semitaj maizoj en 0.2 muo (1 muo = 1/15 hektaro) da kampo, kaj Li Mingŝan detale registris lian sperton.

Post diskutado la scienca kaj teknika grupo komencis sian eksperimenton pri miksita kulturado de maizo. Kiam la printempe semita maizo spikiĝis, ili semis la malfruan. Tamen la malgrandaj interspacoj inter la printempaj maizplantoj malebligis bonan aerumadon kaj sunumadon kaj malutilis al la kreskado de la plantidoj, tiel ke ili fariĝis flavaj kaj malfortaj, kaj iom poste ĉiuj sufokiĝis. Sed la junuloj ne timis malsukceson kaj denove transplantis maizplantidojn.

Estis domaĝe, ke en la sekvanta tago post la transplanto falis torenta pluvego kaj ĉiuj plantidoj difektiĝis. La junuloj do faris triafojan transplantadon.

*Eksperimenta kampo de la brigado*



Tiam la partia filio kuraĝigis junulojn esti mastroj de la naturo kaj kombini sian entuziasman laboron kun scienca metodo.

Sukceso dependas de homa klopodo. En tiu eksperimentado la pomua produktokvanto de la printempe semita maizo atingis 493 kilogramojn, tamen tiu de la malfrua maizo estis nur 29 kilogramoj. Tiuj 29 kilogramoj estis aŭguro de venko. Se oni povas produkti pomue 29 kilogramojn da maizo, oni do certe povas produkti 290 kilogramojn. La praktiko firmigis la memfidon de la junuloj.

Subtenate de la partia filio la kvar produktogrupoj de la brigado semis en la sekvanta jaro respektive 20 muojn da tiaj maizoj. La pomua produktokvanto de la printempe semita maizo atingis 402 kilogramojn kaj tiu de la malfrue semita maizo 325 kilogramojn. Tio signifis, ke la pomua produktokvanto de la du specoj de maizo estis 727 kilogramoj. Samtempe la junuloj faris eksperimentadon pri miksita kulturado de kotono kun tritiko kaj kotono kun pizo kaj akiris relative bonan rikolton de tiuj plantaĵoj.

## II

En la ora sezono de 1969, juna kompartiano Li Mingŝan veturis al Pekino por partopreni jubileon de la 20-a datreveno de la Nacia Festo, kun profunda klasa sento de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hehengĉeng kaj fruktoj de la scienca terkulturado, kaj vidis la grandan gvidanton de la ĉina popolo Prezidanton Maŭ. Tiam la filo de malriĉkamparano dronis en senkompara feliĉo kaj faris firman decidon iri la vojon neniam iritan de antaŭuloj kaj grimpi montpinton neniam grimpitan de aliaj en la scienca eksperimentado pri terkulturado.

Reveninte de Pekino, li kunportis grandan kuraĝigon kaj intiman zorgon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ al la vasta amaso de la komunumanoj. En tiu nokto li venigis la junajn kolegojn, rakontis al ili sian impreson pri la Nacia Festo kaj diskutis kun ili kiel pli bone fari sciencan eksperimenton pri terkulturado por gajni ankoraŭ pli bonajn rikoltojn de greno kaj kotono. Subtenate de la partia filio ili komencis novan eksperimentadon.

Venis printempo. La tritikplantoj de la eksperimenta kampo estis en smeralda verdeco. Tiam la junuloj semis kotonon. Kiam maturiĝis tritiko, ili ĝustatempe semis la malfruan maizon. Kiam kotonplantoj ekfloris, la malfruaj maizplantoj ekĝermis

kun verdeco kaj prospereco. La junuloj atenteme observis kreskon kaj spikiĝon de la maizo, kreviĝon kaj floriĝon de kotonkapsuloj kaj ĉiujn ĝiajn aliajn malgrandajn ŝanĝojn. La maljuna malriĉkamparano Vang Fenglin laŭde diris: "Tiuj junuloj ja posedas la leĝon de plantaĵoj."

Iun profundan nokton subite furiozis ŝtormo. Li Mingŝan, Vang Hinian kaj Li Junhiang kune rapidis al la eksperimenta kampo. Ili dragis drenajn kanaletojn unu post alia kaj restarigis kotonplantojn faligitajn de la ventego. En la sekvanta tago ili sterkis la malfruajn maizplantojn. Tiel diligente laboris la junuloj, kiuj havas grandan komunisman idealon.

En aŭtuno de 1970, en siaj 2 muoj da eksperimenta kampo la junuloj rikoltis sume 640 kilogramojn da tritiko, 280 kilogramojn da malfrua maizo kaj 138 kilogramojn da sensemigita kotono. Tio signifas, ke ili rikoltis pomue 69 kilogramojn da sensemigita kotono kaj 460 kilogramojn da greno.

## III

La scienca terkulturado ĉiam progresas kaj atingis sukcesojn malgraŭ malfaciloj kaj malvenkoj.

Somere en 1970 ili semis pli ol 200 muojn da vintra tritiko. La plantoj grandaree kliniĝis dum sia florado kaj fekundiĝo kaj kaŭzis seriozan reduktiĝon de la produkto. Tio multe pezis sur la koro de la junuloj. Ili multfoje studis koncernan instruon de Prezidanto Maŭ kaj decidis selekti kaj kulturi bonajn speciojn por miksita kulturado por krei kondiĉojn al riĉa rikolto en granda areo.

Por fari sisteman selektadon kaj kulturadon de bonaj semoj la junuloj legis multajn sciencajn kaj teknikajn materialojn. Ili iom post iom konis, ke pro influo de natura hibridigo kaj apartaj vivaj kondiĉoj, plantaĵoj povas kreskigi spikojn kun bona aparteco. Por sisteme selekti kaj kulturi semojn oni nepre devas unue trovi tiujn semojn kun bona aparteco.

Somere en tiu jaro por trovi bezonatajn bonajn semojn la junuloj iris de unu kampo al la alia. Kun iu specio nomata "Maŭ-a-fu" kiel bazo, ili selektis pli ol 5,000 tritikajn spikojn. Zorgema praktikado pruvis, ke tiu specio povas rezisti kontraŭ kliniĝo kaj rusto, doni altan produkton kaj taŭgas por miksita kulturado. La junuloj ĝin alinomas "Hehjuan n-ro 1". Nun ĝi jam estas vaste aplikata en la brigado.



*Junaj komunumanoj faras hibridigan eksperimenton en eksperimenta kampo.*

Foje, dum flegado de kotonplantoj Li Mingŝan trovis ke sur iu planto kun strikte interplektiĝintaj branĉoj pendis sume 36 kapsuloj. Li per ŝelo de maizo faris signon al ĝi. Aŭtune li aparte rikoltis ĝin por akiri semon. Ĝuste el tiu semo ili elkulturis bonan specion de kotono "Hehjuan n-ro 1" disvastigatan nun en granda areo. Kun strikte interplektiĝantaj mallongaj branĉoj kaj kapsuloj kreskantaj ĉirkaŭ la ĉefa trunko, ĝi taŭgas por densa kaj miksita kulturado.

La grupo ankaŭ faris eksperimenton pri hibridigo de plantoj laŭ genetiko. En la lastaj jaroj ili kolektis dekojn da malsamaj specioj de kotono, tritiko, maizo kaj sorgo kaj faris 40-50 hibridigojn.

La scienca kaj teknika grupo estas ĉefa forto de la scienca terkulturado de Hehengĉeng-brigado kaj la malgranda kultivejo kun areo de 3 hektaroj administrata de la junuloj estas eksperimenta bazo de la scienca terkulturado, kampo por kulturi bonajn speciojn kaj lernoĉambro por eduki junulojn tutanime terkulturi por la revolucio. Ili diris: "En la kamparo estas scio nefinlernebla kaj afero nefinfarebla por ni. Tie ni junuloj povas multon fari."

VEJ MIN:

# Kultivi kinkonojn por la patrolando

NOKTE, aparte kvieta estas Hujminŝan en la sudokcidenta landlima Junnan-provinco de nia patrujo. Post tuttaga streĉa fizika laboro jam profunde endormiĝis la batalantoj de la kvara kompanio de iu produkta-konstrua trupo tie garnizonanta. Tamen en iu ĉambro ankoraŭ brilis lamplumo. Sub la kerosena lampo iu knabino absorbiĝis en ordigado de materialo pri "Proceso de Kultivado de Kinkonaj Arbidoj". Tio estas registro pri scienca eksperimentado de kulturado de kinkonaj arbidoj farita de ŝi kaj ŝiaj kamaradoj. La knabino estas intelekta junulino Hin Ven, kiu venis de Pekino antaŭ kelkaj jaroj.

## DILIGENTA LABORADO

En aŭtuno de 1968, Hin Ven, kiu apenaŭ atingis la aĝon de 17 jaroj, diplomiĝis el la Pekina Mezlernejo 125. Informiĝinte, ke estas bezonata aro da junuloj por kulturi kinkonojn en Junnan, Hin Ven kaj ŝiaj kunlernantoj konkure sin anoncis por peti permeson iri tien. Post nelonge ili venis al Hujminŝan tagnokte sopirata de ili kaj ricevis varman bonvenigon de tieaj kamaradoj. Gvidanta kamarado diris al ili: "Vi ekspluatos grandajn terpecojn por kultivi kinkonojn sur tiuj dornoplenaj kaj sovaĝaj montoj." El la prezentado de gvidantaj kamaradoj ŝi sciis, ke kinkono estas ĉefa krudmaterialo por ekstrakti kininon — la efikan medikamenton por kuraci malarion. En la pasinteco la kinino bezonata de nia lando estis importita. Nur en la Granda Proleta Kultura Revolucio ni sukcesis en kulturado de tia arbo kaj komencis energie kulturi ĝin laŭ decido de la registaro. Hin Ven kune kun aliaj firme decidis bone konstrui la novan hejmlokon per siaj propraj manoj kaj kovri ĉiujn nekulturitajn montojn per kinkonoj.

Hin Ven estis sendita al la arbidkulturejo de kinkonoj. Ŝi ĉiam montris grandan diligentecon en sia laboro por la patrolando. Post tagmanĝo, kiam ĉiuj ripozis, ŝi iris al la kulturejo por ripari la difektitajn ŝprucigilojn kaj rompitajn tenilojn de ŝpatoj. En pluva nokto, timante, ke pluvo detruos la bedojn de la arbidoj, ŝi kuris tien kaj fosis sulkojn por dreni pluvakvon. Vidante, ke ŝi estas ĉiam okupata de la mateno ĝis la vespero, kamaradoj diris: "Hin Ven havas altan respondecemon al la revolucia afero kaj apartan amon al kinkono."

## ZORGEMA FLEGADO

En printempo de 1970, post kiam Hin Ven eklaboris kiel estro de la arbidkultura subplotono, ŝi semadis kun siaj batalantoj. Tiam nia lando ankoraŭ ne povis sufiĉe sin provizi per semoj de kinkono, kaj por aĉeti 1 kilogramon da tiaj semoj oni devis pagi 1 kilogramon da oro. Tenante en la mano kilogramon da semoj donitan de la supera instanco ŝi faris firman decidon: nepre ĝermigi multe kaj bone la semojn malfacile akiritajn. Tamen kiel oni povas facile ĝermigi la semojn kiuj estas malgrandaj kiel sezamgrajnoj kaj maldikaj kiel papero. Tio pezis sur ŝia koro. Tion rimarkinte, la politika direktanto de la kompanio varme kuraĝigis ŝin.

La kuraĝigo kaj subteno de la gvidanto donis forton al Hin Ven. Tuj ŝi fondis eksperimentan grupon kune kun siaj kolegoj. Por solvi la problemon de ĝermigado de kinkonoj ili unue resumis sperton pri semado kaj ĝermigado de la unuaj kinkonoj. Ĉar la arbidoj de kinkono kun malforta vivipovo timas sunlumon, ili alportis fekundan grundon el praarbaro kaj metis ĝin sur la bone faritajn bedojn kaj rigore desinfektis ĝin. Se oni surkovras la tre malgrandan semon de kinkono per dika tertavolo, ĝi ne povas facile ĝermi, tial ili faris esploradon kaj fine trovis taŭgan dikecon de kovranta tavolo de grundo.

Post la semado Hin Ven ofte iris al la bedoj por observi, kiel statas la ĝermado. Iutage ŝi rimarkis, ke en iuj bedoj la semoj tute ne ĝermis. Post atenta observado ŝi trovis, ke la kernoj de la semoj estas formanĝitaj de insektoj. Tio tre maltrankviligis ŝin. Ŝi pensis en si: "Kial mi trovis neniun insekton en plurfoja observado dum la tago? Ĉu la insektoj agas nokte?" Hin Ven do

venis kune kun kelkaj kamaradoj al la bedoj kun elektra torĉo en profunda nokto. Tie ili vere kaptis kelkajn grilojn. Post provado ili konstatis, ke la kernoj de la semoj estas efektive formanĝitaj de griloj. Ili tuj alprenis taŭgajn rimedojn por ekstermi grilojn. Dank' al zorgema flegado de Hin Ven kaj ŝiaj kolegoj, ĝermis 39 % de la kinkonaj semoj en tiu jaro, eĉ 71 % en iuj bedoj, kio superis la fremdlandan nivelon de nur 20 % de ĝermipovaj semoj laŭ tiama literaturo, kaj per tio faris ĝojindan kontribuon al disvolviĝo de kinkonoj de nia lando.

## VENKI MALSANON DE KINKONO

Post la sukcesa ĝermigado de kinkonoj Hin Ven kaj ŝiaj kolegoj alfrontis alian malfacilan problemon.

En aŭtuno de 1971 arbidoj de kinkonoj suferis de velkozo, kiu havas fortan kaj rapidan infektecon. Se la arbidoj eksuferis de ĝi, la folioj velkiĝis kaj nigriĝis post nur 2-3 tagoj kaj ili mortis unu post alia. Laŭ la antaŭa sperto oni devis elfosi la malsanajn arbidojn kun la radikoj kovrataj de grundo kaj ankaŭ ĉirkaŭajn bonajn arbidojn por ĉesigi disvastiĝon de la malsano. Tamen kia domaĝo tio estis por la gejunuloj. Hin Ven pensis: "Ĉu oni ne povas trovi alian rimedon por savi la arbidojn?"

Por solvi tiun problemon, ŝi ĉie serĉis materialojn pri prevento de malsanoj de vegetaloj kaj diligente studis pri agronomio kaj kultivaj teknikoj. Foje, jam estis profunda nokto, tamen en la ĉambro de Hin Ven ankoraŭ brilis lamplumo. Intelekta junulino Ĝang senbrue iris al ŝi kaj ameme diris: "Malgranda Hin, jam estas malfrue, iru ripozi!" La lasta respondis: "Jes, mi tuj iros." Tiam ŝi zorgeme kudris malsanan folion de kinkono sur la notlibron pri scienca eksperimento, en kiu jeno estas skribita: "Malsano estas la ĉefa tuj solvenda kontraŭdiro en la nuna tempo." Ĉe tio varma fluo trakuris la koron de Ĝang. Ŝi tuj komprenis, ke la disvastiĝanta malsano de kinkonoj maltrankviligis Hin Ven kaj ŝi ne povis kviete dormi.

Por solvi la problemon, ankaŭ gvidantoj de la partia filio ofte iris al la arbidkulturejo kaj kune kun Hin Ven kaj ŝiaj kamaradoj klopodis por trovi preventan metodon. Ili kuraĝigis la junulojn ke ili neniam timu malsukceson kaj malfacilon, kaj alvokis ĉiujn batalantojn de la kompanio kontribui por venki kaj preventi la velkozon de kinkonoj.

Informiĝinte ke la scienca eksperimenta grupo bezonas iun drogherbon por fari agrikulturan medikamenton, iu veterana laboristo kaj sanitaristo mem iniciate iris en montaron por trovi ĝin.

Junaj kamaradoj helpis Hin Ven foliumi materialojn kaj alportis al ŝi librojn pri vegetala kulturado.


Gepatroj de iuj intelektaj junuloj, kiuj informiĝis pri tiu afero, rapide transsendis al ŝi diversajn receptojn de agrikultura medikamento.

Ĉio ĉi tio donis kuraĝon kaj saĝon al Hin Ven por venki malfacilojn. Post multfoja eksperimentado ŝi kaj ŝia eksperimenta grupo fine trovis rimedon por kuraci kaj preventi velkozon.

Dum la pasintaj du jaroj ili fundamente ekposedis la leĝojn de estiĝo kaj disvolviĝo de la malsano de kinkono kaj trovis kelkajn efikajn rimedojn por ĝin kuraci, kio multe altigis la procenton de la vivipovaj arbidoj.

Sin okupante pri la supre menciita laboro Hin Ven kaj ŝiaj kamaradoj ankaŭ faris sciencajn eksperimentojn pri multaj temoj kaj atingis bonan sukceson. Ĉiujare ili meznombre ŝparis por la ŝtato preskaŭ dekmil juanojn kaj malaltigis la koston de arbido je 60 %.

Nun ĉie sur Hujminŝan estas vicoj da arbidbedoj de kinkonoj. Rigardante la prosperajn kinkonojn Hin Ven sentis neesprimeblan ĝojon en la koro kaj decidis sin dediĉi por disvolvi la kultivadon de kinkonoj de la patrolando.



GAN ZUĈANG:

# Heredigi la revolucian spiriton de penema lukto

*Gepatroj, precipe maljunaj, ofte pripensas en si kion ili devas heredigi al siaj infanoj. Tio estas nemalfacile komprenebla. Sed oni tute malsame pensas pri tio en la malsamaj socioj kaj el la starpunkto de la malsamaj klasoj. Do, kion deziras heredigi revoluciuloj de la maljuna generacio de la nova Ĉinio al siaj infanoj? En la jena artikolo, veterana ruĝarmeano Gan Zuĉang klare diras: La maljunaj revoluciuloj volas heredigi al siaj infanoj revolucian tradicion de penema luktado persone iniciatitan de Prezidanto Maŭ Zedong. Per siaj agoj Gan Zuĉang tenas en si laborstilon de penema luktado dum kelkdek jaroj kaj donas per tio ekzemplon al la gejunuloj. Liajn aferojn ni konigis al la legantoj jam en n-ro 1 de EPĈ, 1973.*

**— La Red.**

Responde la alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong, multaj intelektaj gejunuloj de Ĉinio iris al la kamparo por ricevi reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj faris grandan kontribuon en la konstruado de la nova socialisma kamparo. Vidante ke ili sane kreskas en la vasta kamparo kaj ke la revolucia afero de la proletaro havas daŭrigantojn, ni maljuna generacio sentis grandan ĝojon.

Kompreneble, ĉiu ajn nova afero ĝermas kaj kreskas ne ĉiam glate, tiel same estas ankaŭ por la iro de la intelektaj gejunuloj en kamparon. Ekzemple, kiam la gejunuloj jam atingis unuajn sukcesojn en la kamparo, iuj tamen pensis en si: Ili povas pene labori mallongan tempon en la kamparo, sed ne volas longtempe vivi tie. Unu el la kaŭzoj de tia penso kuŝas en tio, ke ili ne klare sciis la tradicion de penema luktado de la Komunista Partio de Ĉinio.

Mi partoprenis en la revolucio en la jaro 1927. La batala vivo en dekoj da jaroj komprenigis min, ke por fari revolucion oni devas havi spiriton de penema luktado. La venko de la ĉina revolucio ja estis gajnita de milionoj kaj milionoj da popolanoj sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, per sangado kaj sinofero en longdaŭra penema luktado.

En la pasintaj jaroj, ni ĉiutage luktis kontraŭ malfaciloj. En periodo de la agrara revolucio (1927-1937), mi laboris kiel fakestro de ĝenerala administrado en iu arsenalo de la Ruĝa Armeo. La fabriko tiam havis nur malbonajn ekipaĵojn kaj ege malmultajn krudajn materialojn. Ni ofte kolektis forĵetitajn feraĵojn en lokoj okupitaj de malamikoj spite de vivdanĝero, kaj vektoportante po pli ol 50 kilogramojn da feraĵo ni revenis al la revolucia bazloko, transgrimpante montojn kaj travadante riverojn. Ni manĝis iom da batato je malsato kaj kvietigis soifon per fontakvo. Foje ni aĉetis ian krudan materialon en monturbo. La malamikoj priserĉis la korpon de ĉiu pasanto ĉe la urbopordo. Kion fari? Ni elpensis rimedon: Ni metis la materialon volvitan per oleita papero en la fundon de sitelo kaj plenigis ĝin per fekaĵoj. Kiam la malamikaj gardistoj vidis tion, ili ĉiuj foriris kovrante la nazon. Jen tiel ni sekure transportis la materialon al la arsenalo. Ĝuste tiamaniere ni elfabrikis tiam pafilojn kaj kuglojn por subteni la fronton.

En la jaro 1934, mi partoprenis en la Longa Marŝo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo. Sur la vojo, pro la persekuto kaj baro de la kuomintangaj reakciuloj, ege mankis al ni greno, kaj tiam plimultiĝis malfaciloj. Iutempe, por forskui la malamikojn, nia trupo devis tagnokte rapidi, tamen

neniu el ni plendis pri peno kaj laco. Iufoje ni dekkelkaj homoj havis nenion por manĝi. Iu kamarado iel akiris vazeton da faboj. Ĉiu el ni ricevis 8 grajnojn kiel manĝporcion por unu tago. Ni manĝis ilin kun akvo kaj daŭrigis la iradon. Sed post nelonge, murmuris nia ventro kaj ni havis neniun forton en la tuta korpo. Precipe dum montogrimpado, ni havis plumbon en la piedoj. Tiam ni havis nur solan ideon: Por gajni venkon de la revolucio, ni certe ne devas postresti. Junaj subapogis maljunajn, fortikaj malfortikajn, kaj ni antaŭen marŝis paŝon post paŝo. En tiu tago ni iris 60 kilometrojn kaj plenumis la marŝan planon. Ĝuste per tiu firma revolucia volo la ruĝarmeanoj venke atingis la kontraŭjapanan bazlokon en norda Ŝenhi trapasante neĝmontojn kaj marĉejon.

En la komenca periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, en koluzio la kuomintangaj reakciuloj kaj japanaj imperiistoj praktikis blokadon kaj balaadon al la kontraŭjapana bazloko, kaj krome okazis seriozaj naturaj katastrofoj en sinsekvaj jaroj en diversaj lokoj de norda Ĉinio, tiel ke pligrandiĝis niaj malfaciloj. Tiutempe mi laboris kiel militista intendanto de la 359-a Brigado. Kaj ni devis mem solvi la provizadon de vestaĵo, oleo, legomoj, papero k.a. Respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **"Eklaboru mem por akiri sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj"**, la kadroj kaj soldatoj de nia brigado decidis "memprovizi kaj defendi la Centran Komitaton de la Partio per ŝpato kaj pafilo". Ni ŝanĝis virgan teron de Nannivan proksime de Jan-an en multajn bonajn kampojn. Peneme luktante la vasta amaso de armeanoj kaj popolanoj de la bazloko trapasis la malfacilajn jarojn kaj gajnis la venkon.

Ĉu ni ankoraŭ devas lukti peneme post la venko de la revolucio kaj ekposedo de la regpotenco de la proletaro? Tiam mi vundiĝis en Hingiang kaj ne povis daŭrigi mian laboron sur gvida posteno. La partia organizo tre zorgis min kaj intencis konstrui domon por ke mi longtempe ripozu. Mi foje-refoje studis la instruon de Prezidanto Maŭ: "...**La ĉina revolucio estas grandioza, sed la vojo post la revolucio estos pli longa, la laboro pli grandioza kaj pli peniga.**" Mi komprenis el tio ke mi devas teni la spiriton en la periodo de revolucia milito, peneme lukti kaj fari iujn fareblajn laborojn. Mi rifuzis dankeme la ripozon kaj permesite de la organizo revenis al mia hejmloko Gianghi en la jaro 1957 por partopreni en agrikultura produktado.

Retrorigardante la dekkelkjaran batalan vivon en la kamparo, mi komprenis, ke por konstrui novan socialisman kamparon oni devas daŭre peneme lukti. Ni prenu la reformadon de akvoabundaj kampoj kiel ekzemplon. 30 aŭ 40 pocentoj de la kampoj de nia brigado estas tiaj rizkampoj, en kiuj koto profundis ĝistalie, kaj eĉ por bubalo estis malfacile iri en la kampo. Kompare kun ordinaraj kampoj, oni bezonis kelkoblan laboron por ricevi kelkonan rikolton en tiaj kampoj. Por ŝanĝi tiun staton ni ĉiuvintre nudpiede laboris en frida akvo por starigi fostojn, plekti barilojn kaj fosi drenkanaletojn. En iu el tiaj kampoj troviĝis 54 profundaj kavoj kaj 237 fontpunktoj. Ni masonis subteran akvedukton laŭ la maniero de kloako en la urbo por planti rizon sur la kampo. En 10 jaroj ĝis 1968 ni transformis tiajn kampojn en stabile altproduktajn. Dank' al la kuna klopodo de la komunumanoj, en nia antaŭe malriĉa kaj sterila montvalo kun multaj kadukaj kabanoj aperis nun novaj domoj, irigaciaj kanaloj kaj elektrolampoj, kaj la meznombra produktokvanto de greno atingis la normon de la ŝtato. Ĉio ĉi tio estas frukto gajnita per penema luktado.

Prezidanto Maŭ Zedong jam delonge diris al ni: **"La starigo de socialisma sistemo malfermis al ni la vojon kondukantan al la ideala stato de la estonteco, kies efektiviĝo tamen dependas ankoraŭ de nia peniga kaj diligenta laborado."** Nun en nia lando arde disvolviĝas amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo. Por konstrui novan socialisman kamparon, necesas ke multaj gejunuloj kun alta volo iru tien por fari sian kontribuon, kaj samtempe tiuj gejunuloj mem al kiuj mankas sperto pri praktika batalo, bezonas iri al la kamparo por hardiĝi en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, kaj kreskigi sian laborkapablon por fari sin daŭrigantoj de la proleta revolucia afero. Dum multaj jaroj, la intelektaj gejunuloj en la kamparo pruvis per sia praktikado, ke ili povas multon fari tie.

Dum la lastaj jaroj, mi ofte pripensis en mi, kion ni devas heredigi al la posteuloj por ke la revolucia regpotenco starigita de la maljuna generacio neniam ŝanĝu sian koloron. Mi pensis, ke se ni heredigos al ili materialajn riĉaĵojn, por ke ili povu vivi senfare, eĉ montoj da oro aŭ arĝento baldaŭ estos forkonsumitaj. Ĉar por vivi senfare ne sufiĉas eĉ oraj montoj. La bona tradicio de penema luktado persone pledata de Prezidanto Maŭ estas la revolucia trezora heredaĵo, kies transdono de generacio al generacio estas ĝuste la deziro de ni maljuna generacio.




ĈE la supra baseno de Mihe-rivero norde de Jimeng-montregiono, Ŝandong-provinco, sin trovas vasta kaj klara lago. Ĝi estas Jejuan-akvorezervejo, la celo de nia vizito. Tiam estis ĝuste aŭtunrikolta sezono. Fiŝkaptaj velŝipoj punktis sur la ŝanĝbrilanta lago kaj komunumanoj streĉe faris falĉadon sur la proksimaj ŝtuparaj kampoj. Sur la draŝejo de la brigado amasiĝis rikoltitaj grenoj. Sur la ŝoseo seninterrompe kuris aŭtoj kaj ĉaroj, per kiuj komunumanoj transportis la plej bonajn grenojn al aĉetstacio de la ŝtato. En 1973 oni akiris alian riĉrikolton en la Jejuan-a irigacia regiono.

En Kongcun-brigado ĉe la orienta bordo de Mihe-rivero ni vidis grizharulon nomatan Caj Ĉangŝun. Li diris al ni, ke Jejuan-akvorezervejo estas konstruita post la Liberiĝo. Ĝi alportis sinsekvajn bonajn rikoltojn al agrikulturo malgraŭ sekeco kaj inundo. Tamen antaŭ la Liberiĝo tieaj kamparanoj multe suferis de inundo kaj sekeco. Kiam venis pluva sezono, la ŝveliĝinta rivero inundis multajn vilaĝojn ĉe ambaŭ bordoj kaj detruis bonajn kampojn. En iu junio pluvego ŝveligis la riveron kaj la furioza torento ruliĝis malsupren. En unu nokto ĝi englutis multajn vilaĝojn kaj bonajn kampojn. Ankaŭ la domo de Caj Ĉangŝun kune kun lia patrino kaj du pliaĝaj fratoj pereis de la torento. Post tio li devis migri aliloken por fuĝi de la katastrofo, sekvante siajn patron kaj pliaĝan fraton. La maljunulo diris: "Tiam ni pasigis tagon kvazaŭ jaron!"

Tieaj kamparanoj timis kaj malamis akvon, tamen sopiris al ĝi, ĉar ili suferis ne nur de inundo, sed ankaŭ de sekeco. Ekzemple, en 1942 la granda sekeco kaŭzis malbonan rikolton de greno, tial granda parto de kamparanoj ĉe ambaŭ bordoj devis forfuĝi aliloken kaj multaj el ili mortis de malsato kaj malsano.

Post la Liberiĝo sub la gvido kaj subteno de la Partio kaj registaro la popolanoj de Linkju multe suferintaj de katastrofoj faris multajn akvoutiligajn konstruaĵojn. En 1958, la jaro de la Granda Antaŭensalto, ili finkonstruis la akvorezervejon kun kapacito de pli ol 160,000,000 kubmetroj en la supra baseno de Mihe-rivero per unu jaro kaj tri monatoj. Kaj poste ili fosis du trunkajn kanalojn kaj branĉajn kanaletojn kun totala longeco de 600 kilometroj, kiuj nun irigacias kampojn ĉe ambaŭ bordoj. De tiam finiĝis plago kaŭzita de Mihe-rivero. Nun la rivero ludas utilan rolon en irigaciado, elektroliverado kaj fiŝbredado.

## MONTETAJ KAMPOJ IRIGACIATAJ

Nin profunde impresis la bonorde starigitaj pumpstacioj sur montetaj kampoj de la Jejuan-a irigacia regiono. Tiuj stacioj alkondukas akvon de Jejuan-akvorezervejo sur montetojn altajn je dekoj da metroj, tiel ke la ŝtuparaj kampoj estas irigaciataj. Iu respondeculo de la akvorezerveja direkcio diris al ni, ke post ekfunkcio de la akvorezervejo la ebenaĵa regiono estas irigaciata kaj la hektara produktokvanto de greno atingis 6,000 kilogramojn, tamen en la montetaro sekeco malbone influis rikolton de greno. Por solvi tiun problemon, la Linkju-a gubernia komitato de la Komunista Partio de Ĉinio fondis prospektoran grupon kun partopreno de kadroj, veteranaj kamparanoj kaj teknikistoj, kiuj iris en la montaron esplori terformon




por ellabori planon de konstruado de pumpstacioj. Kongcun-brigado konstruis du pumpstaciojn kiuj garantiis al montetaj kampoj bonan rikolton ĉu en sekeco, aŭ en inundo. La komunumanoj diris al ni ke kvankam ili renkontis multajn malfacilojn en la konstruado pro manko de spertoj, tamen ili plenis je memfido kaj forto, pensante, ke la sekecaj montkampoj estos irigaciataj kaj la nova montregiono abunda je greno kaj arbaro konstruiĝos per iliaj manoj. Komunisto Ma Hiangtu de tiu brigado donis al ili bonan ekzemplon. Ma Hiangtu estis veterana ruĝarmeano provita en milito. Por konstrui novan socialisman vilaĝon li revenis al sia hejmloko. Informiĝinte ke la brigado konstruos pumpstacion, li meminiciate petis permeson de la partia filio de la brigado por partopreni en tiu laboro. La lasta komisiis al li la oficon de la estro de konstrua grupo de la pumpstacio. Kvankam li jam estis 67-jara kaj ne tiel sana, tamen li daŭre disvolvis gloran tradicion de la Ruĝa Armeo kaj energie laboris sur la konstruejo. Iunokte subite difektiĝis pumpilo kaj akvo en la fundamento ne povis esti fordrenita. Por ne malhelpi laboron en la sekvanta tago li kune kun kelkaj junuloj forportis la akvon per siteloj. En la sekvanta tago kiam la komunumanoj venis al la konstruejo kaj sciis, ke li ne dormis la tutan nokton, ili profunde kortuŝiĝis. Kuraĝigite de lia spirito la komunumanoj konkure

*Riĉa rikolto de tritiko de Vazi-brigado*



prenis sur sin pezan laboron kaj rapide plenumis la taskon de konstruado de la pumpstacio.

En Ĉanggoŭ-brigado ni vidis pumpstacion, kiu estas provizita per akvotuboj kun longeco de 920 metroj kaj havas povon levi akvon ĝis alteco de 32 metroj. Por ĝin konstrui oni devis fosi tunelon kun longeco de 500 metroj. Kiam ili fosis pli ol 100 metrojn, komplika formacio kaj granito malrapidigis la fosadon. Tiam kamarado Tan Janfu, vicsekretario de la gubernia komitato de KPĈ, venis al la konstruejo kaj laboris kune kun ĉiuj en la tunelo por trovi metodon por akceli rapidecon de la konstruado. Kiam ni pririgardis tiun tunelon la komunumanoj rakontis al ni aferojn pri kamarado Tan Janfu en la laborado. Nun en la tuta irigacia regiono oni jam konstruis 68 pumpstaciojn, kiuj ebligis irigaciadon al 4,000 hektaroj da montetaj kampoj.

### "KUKURBOJ SUR LONGAJ TIGOJ"

Irante norden laŭ la du trunkaj kanaloj oriente aŭ okcidente de la akvorezervejo ni vidis multajn malgrandajn akvorezervejojn ĉe iliaj ambaŭ flankoj. Ili estis kvazaŭ kukurboj sur longaj tigoj. En Hugiaguanĝuang-vilaĝo, kiam ni rigardis iun malgrandan akvorezervejon, komunumanoj diris al ni, ke en ordinara tempo ĝi povas rezervi pluvakvon kaj kolekti akvon ellasitan de la granda akvorezervejo dum pluvsezono. Kiam oni irigacias kampojn per akvo en trunka kanalo, ĝi povas kolekti postlasitan akvon en la kanalo, tiel ke multiĝis rezerva kvanto de akvo en Jejuan-akvorezervejo kaj oni povas uzi ĝin por bredi fiŝojn. En printempo de 1971 tiu brigado estis atakata de sekeco. La komunumanoj akvumis tritikon per akvo de la trunka kanalo kaj faris semadon per akvo de sia propra akvorezervejo kaj en tiu jaro ili akiris riĉan rikolton.


La Linkju-a gubernia komitato de KPĈ ĝustatempe disvastigis la sperton de tiu vilaĝo. Post penema luktado de kelkaj jaroj en la tuta gubernio stariĝis 52 malgrandaj akvorezervejoj kun totala akvorezerva kvanto de pli ol 10,000,000 kubmetroj, kio egalas 10% de tiu de Jejuan-akvorezervejo kaj multe plivastigis la irigacieblan areon. Ĉar diversaj akvorezervejoj kaj kanaloj interligiĝas unu kun alia, tial en la pluvsezono granda akvorezerejo ellasas superakvon kaj malgrandaj akvorezervejoj kolektas ĝin. Dank' al tio en rezervejoj ĉiam estas akvo dum la tuta jaro. Kiam oni bezonas akvon, ekfunkcias samtempe ĉiuj akvorezervejoj kaj tio multe mallongigis la tempon de irigacio.

### NOBLA SPIRITO

En la vizitado aparte nin kortuŝis la nobla komunisma spirito de la komunumanoj de Fugialiĝaŭ-brigado, kiu cedis akvon al aliaj komunumoj kaj brigadoj.

Tiu brigado situas en la supra baseno de la Jejuan-a irigacia regiono kaj la trunka kanalo fluas

*La ĉefa baraĵo de Jejuan-akvorezervejo*





preter la vilaĝo, tiel ke tre oportune estis por ili uzi akvon. Tamen pensante, ke frataj komunumoj kaj brigadoj ĉe la malsupra baseno bezonas akvon, ili plejeble ŝparis akvon. Ili diris: "Nia brigado sola akiras riĉan rikolton, tio estas malgranda kontribuo al la ŝtato. Oni faros pli grandan kontribuon al la ŝtato, se nia tuta irigacia regiono akiras altan produkton." Ili do fosis putojn por ĉerpi subteran akvon. Nun lernante tiun spiriton komunumoj kaj brigadoj de la ebenaĵa regiono fosis centojn da maŝinputoj por ŝpari akvon en akvorezervejoj por subteni komunumojn kaj brigadojn en la monteta regiono. La lastaj, por ne vanigi la favoron de la antaŭaj, multe entreprenis kampan konstruadon. Ili klopodis por fari altnormajn ĝardenajn kampojn por faciligi irigacion kaj kulturadon. En la pasintaj kelkaj jaroj ili akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn kaj faris ĉiam pli grandajn kontribuojn al la ŝtato.



Bredado de perlokonkoj

Nun ĉu en la ebenaĵo, ĉu en la montregiono ĉie regas prospereco. Multaj sovaĝaj kaj kalvaj montetoj jam fariĝis fruktoĝardenoj kaj morusarbaj kampoj. En 1973 la tuta irigacia regiono produktis 950 tunojn da fruktoj, kaj la kampoj antaŭe difektitaj de Mihe-rivero akiris novan vivon. Nun fiŝoj produktitaj de Jejuan-akvorezervejo jam estas vendataj sur merkato. Sur la orienta kaj okcidenta trunkaj kanaloj unu elektrejo jam komencis produkti elektron, kaj la alia estos baldaŭ finkonstruita. Depost ekfunkcio de Jejuan-akvorezervejo la tuta irigacia regiono akiris ĝojindan disvolviĝon en produktado de greno kaj la hektara produktokvanto de greno pliiĝis de 300 kilogramoj antaŭ la Liberiĝo ĝis 6,675 kilogramoj, per kio ili ĉiujare liveris al la ŝtato grandan kvanton da greno. Iuj aliaj brigadoj akiris grandan pliprodukton. Ekzemple, en Fugialiĝaŭ-brigado la hektara produktokvanto de greno jam atingis 9,750 kilogramojn. Kun senĉesa kresko de la kolektiva ekonomio la meznombra enspezo de la komunumanoj pliiĝis je pli-ol-duoblo kaj ili vivas en feliĉo.





## NOVAJ ĈINAJ ESPERANTAJ ELDONAĴOJ

### Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong (Volumo II)

En tiu ĉi volumo kolektiĝis 40 verkoj de kamarado Maŭ Zedong en la periodo de la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en julio de 1937 ĝis la rebato de la dua kontraŭkomunista tajdo levita de Ĉiang Kajŝek en majo de 1941.


Tolbind. 464 p. 15.2 × 22.2 cm.


Prezo: £ 0.88 US$ 2.50 Enoj 900 Gld. 9.00

### La Deka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio (Dokumentoj)

96 p. kun 15 fotoj 13 × 18.5 cm.

Prezo: £ 0.08 US$ 0.20 Enoj 80 Gld. 0.75






Parto de Lasao

Ora firsto de Potala-palaco



Fresko en Potala-palaco (pentrita en la mezo de la 17-a jarcento p.K.)




Kiel antikva urbo en la sudokcidenta limregiono de Ĉinio, Lasao kun historio de pli ol 1300 jaroj staras en la mezo de la Tibeta Altebenaĵo, nordborde de la rivero Lasao, absolute alte je 3,600 metroj. Antaŭe Lasao renomiĝis pro Potala-palaco ekkonstruita en la unuaj jaroj de la 7-a jarcento p. K. Nun ĝi estas politika, ekonomia kaj kultura centro de Tibeto.

Antaŭ la Liberiĝo Lasao estis surtera infero por la tibeta popolo. La centoj da grandaj servutulmastroj de Tibeto loĝis tie ĉi kaj ĝuis luksan kaj diboĉan vivon, dume miloj kaj dekmiloj da servutuloj almozpetis kaj tranoktis sur stratoj kaj dronis en mizera abismo. Kvankam Lasao havas vastan ebenaĵon ĉirkaŭatan de montoj kun milda klimato konvena al agrikulturo, tamen sub la regado de la feŭda servuta reĝimo la politiko estis malluma, la ekonomio velka kaj la kulturo postiĝinta. La urbo aspektis kompatinde vundoplena: kotaj stratoj, kadukaj domaĉoj, montoj da ruboj. . . En ĉirkaŭurbo la riverbordo longtempe mordata de la fluo estis plena de ŝtonoj, gruzoj kaj veproj. La agrikulturo estis tre malprogresa kaj la grena produktokvanto estis tre malgranda.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la lasaa popolo konstruis Lasaon en socialisman urbon de la patrio. La nuna Lasao estas duoble pli granda ol la antaŭa. Vicoj post vicoj da novaj domoj, asfaltitaj stratoj, ekspozicio, kultura palaco, magazeno k.a. konstruiĝis sur la antaŭaj marĉejoj plene kovrataj de herboj. La loka industrio kreskis de nulo: Oni starigis tie unu post alia elektrejon kaj dekojn da fabrikoj de aŭtoriparado, konstruaj materialoj, ŝpinteksado, kemiaĵoj, sukero, agrikulturiloj, farunmuelado, olepremado, manĝaĵoj k.a. Sane kreskas laborista vicaro el 3,000 tibetanoj. La hektara produktokvanto de greno de la komunumoj en la antaŭurbo kreskis de 750 kg. ĝis 3,000 kg. La specoj de legomoj disvolviĝis de nenio ĝis pli ol 50, kio riĉigis kaj plibonigis la popolan vivon.


Antaŭ la Liberiĝo troviĝis en Lasao neniu lernejo kaj hospitalo servanta al la laboruloj. Nun tie funkcias 39 ŝtataj aŭ kolektivaj mezaj kaj elementaj lernejoj kun proksimume dek mil lernantoj. En la urbo estas 4 modernaj hospitaloj kaj multaj kuracejoj kies kuracon la laboruloj-tibetanoj ĝuas senpage.

La Lasaa Tapiŝa Fabriko produktas tapiŝojn kun nacia stilo.



Tibetanaj teknikistinoj de veterinara scienca esplora instituto





La hidroelektra centralo Nagin de Lasao



Feriado en la Popola Parko



HIAŬ MU:

# La Popola Komunumo Ruĝa Flago

La ĉiamverda Vuĝi-montaro staras sur meza Hajnan-insulo de la lando, kaj per siaj etenditaj kvin fingroformaj montpintoj ĝi kvazaŭ paradas pri sia fekundeco kaj beleco.

La popola komunumo Ruĝa Flago koncentre loĝata de li-naciecaj popolanoj, kiun ni vizitis, situas en la profundo de tiu ĉi montregiono.

En la nomita komunumo kun areo de pli ol 200 kvadrataj kilometroj montoj viciĝas seninterrompe. La 530 hektaroj da agroj kaj pli ol 6,700 li-naciecanoj dise loĝas en valetoj. Antaŭ la Liberiĝo tiu loko estis trafike izolita de la montoj, kaj la li-oj faris agrikulturan produktadon per primitiva metodo generacion post generacio. La naciaj kaj klasaj subpremado kaj ekspluatado dronigis ilin en ekstreman malriĉecon kaj epidemio furiozis tie. Nun la li-naciecaj popolanoj jam fariĝis mastroj de sia lando, kaj ankaŭ la montregiono tute ŝanĝiĝis. La vizitantoj povas rekte atingi per aŭto la sidejon de la komunuma oficejo kaj ĝiajn multajn produktajn grupojn. Ambaŭflanke de la ŝoseoj viciĝas ŝtuparaj kampoj kaj kultivejoj de ekonomiaj plantoj en bonordo. La scienca kultivado senĉese altigis rizan produktokvanton, kiu nun atingis ĉiuhektare 9,150 kg., t.e. 12-oblon de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Ankaŭ la forstumado, brutobredado, fiŝbredado kaj aliaj flankokupoj havis disvolviĝon. Nun la komunumo Ruĝa Flago jam fariĝis fame konata avangarda kolektivo de la insulo en la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo.

## ILI NE PLU DEPENDAS DE FAVORO DE LA ĈIELO

En tempo de aŭtuna rikolto ni venis al la nomita komunumo. Je la unua vido ni trovis, ke oraj rizplantoj ondis de valetaj fundoj ĝis deklivoj. Tio aŭguris alian riĉan rikolton!

Estas mirinde, ke tiuj fekundaj kampoj kreiĝis per reformado de sterilaj kampoj kaj kulturebligo de virga tero post la Liberiĝo, precipe post la fondiĝo de la komunumo. Antaŭ la Liberiĝo la rizkampoj de tiu loko nombriĝis nur 133 hektarojn, tiuj sur deklivoj ofte suferis de trosekeco kaj tiuj en valetaj fundoj de inundo. Kaj krome, oni povis kultivi rizon nur unu fojon en ĉiu jaro kaj nepre post pluvo. Tiam ĉiuj relative fekundaj rizkampoj estis okupitaj de bienuloj, tial la malriĉaj li-oj povis nur kulturebligi virgan teron por vivtenado. Ili hakis kaj forbruligis sovaĝajn lianojn kaj veprojn, poste fosis kavetojn per pintigitaj lignaj bastonoj sur la tero por semado. Sen feraj ins-

*Ekspozicia angulo pri la komunumo en la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en Kantono*



trumentoj por plugi rizkampojn ili devis uzi lignajn plugilon kaj erpilon aŭ simple peli bovojn en la kampojn por tretado. Post la semado ili ne flegis la plantojn. Dum la rikoltado ili devis pluki la rizajn spikojn pro manko de falĉiloj. Per tia kultivado ili povis rikolti pohektare nur 750 kg., se la vetero favoris kaj ne okazis katastrofo. Tial ilia kultivado tute sin apogis sur la ĉielo.

Nun oni ne plu povas trovi spuron de tia malnova produktado. La komunumo kreis 373 hektarojn da kampoj kaj plenumis 61 malgrandajn akvoutiligajn konstruojn. Krome anstataŭ unufoje oni komencis kultivi du- aŭ tri-foje en unu jaro kaj forlasis la kulturadon de rizo sur senakva kampo, kio estas temporaba kaj malmulte fruktodona. Multaj el ĝiaj brigadoj jam uzas buldozojn por kulturebligi virgan teron kaj traktorojn, novtipajn plugilojn, erpilojn kaj draŝmaŝinojn en kulturado kaj rikoltado. La maŝina kultivado multe altigis la produktivon kaj liberigis la komunumanojn de peza fiziklaboro.

Ĉiu sukceso estas akirita de la komunumanoj per diligenta laboro.

Pli ol duono de la rizkampoj de iu brigado nomata Fanmaŭ estis kun dika ŝlimo kaj malvarma fundo, kio malfaciligis la kreskadon de rizplantoj kaj la kultivadon. Sub la gvido de la brigada partia filio la komunumanoj fosis dekojn da kanaletoj ĉirkaŭ tiuj kampoj por dreni akvon, poste aldonis al ili multe da fosfora kaj kalia sterko kaj bruligita tero por altigi la grundan temperaturon, kaj konstruis surmonte serpentajn kanalojn por alkonduki fontakvon al akvomankaj rizkampoj. Tiamaniere, bona rikolto estas garantiata malgraŭ trosekeco aŭ inundo kaj la produkta kvanto altiĝis stabile.

Ankaŭ la aliaj brigadoj, kiujn ni vizitis, plejparte havas siajn irigaciajn konstruaĵojn aŭ novan planon de konstruado. La sciencaj eksperimentaj grupoj de ĉiuj brigadoj partoprenis en la projektado kaj konstruado de ili. Nun tiu komunumo havas 160 li-naciecajn agronomiajn laborantojn, kiuj antaŭe havis nenian kulturan scion, sed sperton akumulitan en longdaŭra produktado, dum nun ludas sian rolon en diversaj produktoj post kulturado fare de la komunumo al ili. Ekzemple, ili plibonigis longdaŭre kulturitajn speciojn de rizo kaj enkondukis novajn laŭ la grundo, klimato k.a. de la loko, anstataŭigis la malnovan sistemon de agrikultura produktado per nova sistemo kreita de ili mem laŭ la montregiona klimato. Ankaŭ ili akiris sukceson en flegado de rizplantoj kaj elimino de malsanoj kaj malutilaj insektoj al plantoj. Dank' al la supre diritaj rimedoj, la pohektara produktokvanto de rizo de la komunumo jam superis en 1964 la normon difinitan de la ŝtato, kaj tiu fariĝis 7,500 kg. en sinsekvaj jaroj ekde 1967. Per tiuj sukcesoj la li-nacieca popolo ne nur finis por

ĉiam la malsatan staton, sed ankaŭ povas provizi ĉiujare la ŝtaton per 1,250,000 kg. da greno.

## FINE MALFERMIĜIS LA "TREZOREJO"

Vuĝi-montaro sin trovas en la subtropika zono kun abunda pluvo kaj fekunda tero, kio favoras al kultivado de multaj plantoj kaj brutobredado. Sed en la pasinteco oni kulturis nur akvan kaj senakvan rizon. La li-nacieca popolo aspiris generacion post generacio, ke la montregiono kiel trezorejo en mito kun neelĉerpebla riĉaĵo subite malfermiĝos kaj portos al ili feliĉon.


Hodiaŭ la bela revo realiĝis.

En la popola komunumo Ruĝa Flago, ĉie oni povas vidi densajn arbarojn de ligno kaj kaŭĉuko, ĝardenojn de ananaso, pipraj kaj olekameliaj arbedoj, fruktarboj, arbidoj kaj legomoj. Vere ni kvazaŭ eniris grandan botanikan ĝardenon.

La produktaj grupoj de tiu komunumo ĝenerale kulturas tiujn plantojn kaj bredas bovarojn, porkojn kaj fiŝojn. Ankaŭ la produktaj brigadoj kaj la komunumo starigis kultivejojn de bonspeciaj plantoj kaj brutobredejojn, kiuj ne nur mem produktas sed ankaŭ provizas la produktajn grupojn per bonspeciaj plantoj, semoj, brutidoj kaj fiŝidoj por helpi ilin en disvolvado de diversaj produktoj.

Montrante kaŭĉukan arbaron sur monteto, komunumanoj de iu brigado diris al ni: "Tiu loko antaŭe estis kalva monteto ŝtonoza. Oni diris ke sur ĝi povas kreski nenio krom herboj. La flankokupa grupo de nia brigado elfosis tie ŝtonojn, plugis la teron kaj plantis sur ĝi kaŭĉukarbojn. Nelonge post plantado, la arbidoj kreskis en arbaron. Nia komunumo jam plantis 267 hektarojn da kaŭĉukaj arboj, el kiuj la plejparto jam maturiĝis kaj povas doni gumon. Komunumanoj ne nur ellernis kultivadon, flegadon kaj gumoprenadon de tiaj arboj, sed ankaŭ povas prilabori gumon en kaŭĉuko-lamenojn."

*Malgranda akvoutiliga konstruaĵo de la brigado*



La valoj kaj montoj de la komunumo riĉas je akvo kaj herboj, kiuj formis naturajn paŝtejojn. La tieaj amasoj kutimiĝis jam delonge al bredado de bovoj kaj porkoj, tamen nur en malgranda nombro. Nun la brutobredado jam multe disvolviĝis en ĉiu produkta brigado kaj grupo. La bovstaloj preskaŭ ĉiuj estas starigitaj sur montoj por oportuna paŝtado, kaj la plugbovoj peliĝis de sur la montoj nur por plugado. La viand-bovoj paŝtiĝis sur la montoj kaj vendiĝis post ilia grasiĝo. De la jaro 1967 ĝis nun iuj brigadoj jam vendis pli ol cent viand-bovojn kaj plug-bovojn. Kaj nun la komunumo bredas pli ol 3,600 bovojn kaj pli ol 4,700 porkojn.

La komunumo okupiĝas ankaŭ pri led-prilaboro, brik-farado, preparado de lignokarbo kaj farado de apogseĝoj, litoj, te-tabletoj kaj korboj per liano, bambuo kaj juto abundaj en tiu loko.

Ĉio ĉi tio rezultis el tio, ke la li-nacieca popolo firme efektivigis la principon de la Partio **"preni grenproduktadon kiel ĉefĉeneron kun samtempa disvolvo de la aliaj"**. Tamen en tio oni devis ne nur venki la malfacilojn pro manko de sperto, sed ankaŭ batali kontraŭ malnovaj kutimoj kaj eraraj pensoj. Ekzemple, sekve de la senĉesa pliprodukto de greno ili ĉiujare superplenumis la grenvendan taskon difinitan de la ŝtato kaj ĉiu el ili havas superbezonan grenon, iuj opiniis ke la kolektivo devas meti la tutan forton nur sur la grenan produktadon, dum aliaj pledis por entreprenado de flankokupoj por pliigi la kontantan enspezon. La grena produktokvanto de iu produkta grupo iam reduktiĝis rezulte de tio, ke ĝi sendis tro multajn laborfortojn al montoj por haki arbojn por vendo; poste ĝi sin turnis al alia ekstremo, ke ĝi entreprenis nur grenan produktadon, kio kaŭzis al ĝi mankon de kontanta mono kaj sekve stagnigis la produktadon. La partia komitato de la komunumo kaj la membroj de la grupo kune kritikis tiajn erarajn pensojn, prenis lecionon el tio kaj kondukis la produktadon sur ĝustan vojon: kaj pliigi la grenan produktokvanton kaj disvolvi flankokupojn samtempe.

Sub la gvido kaj racia aranĝo de la komunumo, la brigadoj jam kulturebligis 300 montojn, kreis pli ol 50 hektarojn da ŝtuparaj kampoj kaj plantis pli ol 400 hektarojn da olekameliaj kaj fruktaj arbidoj kaj pipraj arbedoj, t.e. ĉiuj familioj havas po 1/15 hektaro da ekonomiaj plantoj. Ĉiujare ili povas liveri al la ŝtato 150,000 juanojn da agrikulturaj



*Kampara kuracistino*

kaj flankokupaj produktaĵoj, porkoj kaj bovoj. La enspezo parte estas distribuita al la komunumanoj kaj la restaĵo de ĝi estas uzata por pliigi la kolektivan akumuladon kaj aĉeti kamionojn, traktorojn k.a. por senĉese altigi la kapablon de mekanikiga produktado.

## LI-NACIECANOJ EN FELIĈO

Ĉe la piedo de Vuĝi-montaro sin trovas kvin riveroj, unu el kiuj fluas tra la nomita komunumo. Ĝi irigacias kampojn kaj provizas la hidroelektrejojn per akvoenergio. En nokto la brila elektrolampa lumo de la li-naciecaj vilaĝoj iluminas la noktan montregionon.

Li-naciecaj maljunuloj diris al ni emociplene: La malriĉaj li-oj pasinte uzis fajron por lumigo, kaj tiam ili aspiris nur uzi kerosenajn lampojn. Neniu tamen pensis ke iliaj vilaĝoj havos elektrolampojn. Ili ofte priskribas la ŝanĝiĝon de sia vivo per jenaj vortoj: En la pasinteco malriĉuloj povis

vektoporti la tutan posedaĵon de sia familio, dum nun ili devas transporti ĝin per kelkaj kamionoj.

La antŭa posedaĵo de unu familio konsistis el sovaĝjuta litkovrilo, argila poto, paro da bambutubaj akvositeloj kaj kelkaj kokosŝelaj bovloj. Multaj homoj fuĝis aliloken portante ilin, kiam iliaj familioj ne povis sin vivteni en iu loko pro subpremado kaj ekspluatado. Malsato kaj epidemio forprenis sennombrajn vivojn de li-oj.


En iu negranda vilaĝo, sin trovas pli ol 30 familioj antaŭe alfuĝintaj. Ni vizitis kelkajn el ili. Inter ili estis vilaĝano Huang Venĝen kiu alvenis tiun vilaĝon en infaneco vektoportate de sia patro. Li travivis tie sian infanecon en malsato. Post la Liberiĝo li edziĝis kaj nun havas sian familion kun 6 membroj. Li kaj lia edzino estas lertaj laborfortoj de la produkta grupo. Ili enspezas po pli ol unu juanon ĉiutage kaj havas pli ol 300 kg. da superbezona rizo ĉiujare. Antaŭ kelkaj jaroj, ili konstruis al si novan tegoldomon kun du ĉambroj, en unu el kies anguloj lokiĝas kudromaŝino kaj en alia estas nova lito kun novaj litkovriloj kaj aliaj mebloj. Tri el liaj infanoj lernas en elementa lernejo kaj la pliaĝa vizitas superan mezlernejon. Huang Venĝen diris al ni, ke li estas pli feliĉa ol lia patro, kaj la infanoj vivas pli feliĉe ol li. Li diris ankaŭ ke ĉiuj aliaj familioj alfuĝintaj nun vivas tre feliĉe, inter ili iuj eĉ havas 500-600 kg. da superflua greno kaj aliaj havas deponitan monsumon de pli ol 1,000 juanoj en banko.

En la malnova socio, la kruela subpremado, ekspluatado kaj diskriminacio de la reakcia reganta klaso kaŭzis al la li-oj ne nur mizeran vivon sed ankaŭ postiĝintecon en kulturo kaj higieno. Tiam en la loko de la nomita komunumo neniu vizitis lernejon. Ili notis aferon per ŝnurnodoj kaj kalkulis per ŝtonetoj. Neniu kapablis memori sian aĝon. Sed nun oni jam starigis tie 17 elementajn lernejojn, inter kiuj du havas klasojn de malsupera mezlernejo. La lernantoj nombriĝas 1,200, t.e. kvinono de la loĝantaro. Krome la komunumo nun havas ok li-naciecajn studentojn, kiuj studas kun subvencio de la ŝtato en universitatoj respektive de Pekino, Kantono k.a., kaj matematikan instruiston en mezlernejo de la Hajnan-a Li-a kaj Mjaŭ-a Aŭtonoma Subprovinco kaj multajn instruistojn en elementaj lernejoj. Aparte atentinde estas, ke sekve de la altigo de la pozicio en politiko kaj kulturo kaj dank' al la eduko kaj kulturado de la Partio aperis granda nombro da li-naciecaj kadroj. Nun tiuj kadroj gvidas ĉiujn produktajn brigadojn kaj grupojn de la komunumo kaj la duono de la kadroj de la komunuma nivelo estas li-naciecaj viroj kaj virinoj.

Antaŭe, en tiu montregiono longe plagis variolo kaj malario. Post la Liberiĝo, la popola registaro alsendis kuracan taĉmenton, kiu rapide eliminis tiujn seriozajn epidemiojn. Post fondiĝo de la popola komunumo, samtempe kun senĉesa pliboniĝo de la vivo kaj paŝo-post-paŝa ĝeneraliĝo de la kulturo kaj eduko, ankaŭ la higiena laboro progresis multe. En la lastaj jaroj multaj komunumanoj transloĝiĝis en novajn domojn unuj post aliaj. Ĉiu produkta brigado nun havas kamparajn kuracistojn, kiuj povas fari kuracadon por la komunumanoj per terapio kombinita de la ĉina kaj okcidenta medicino. La komunuma kuracejo nun starigis medicinan, ĥirurgian kaj ginekologian fakojn kaj ankaŭ havas litojn por gravaj malsanuloj.

Kiam la komunumanoj priparolas la profundan ŝanĝiĝon en ĉiuj flankoj de la li-naciecaj vilaĝoj, ili havas senliman dankemon al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, rigardante la favoron donitan de la Partio al ili kiel la grandiozan Vuĝimontaron! Ili konservas en la ekspoziciejo de la brigado la pasinte uzatajn jutajn vestojn, litkovrilojn kaj vektoportilojn en fuĝado por eduki la junan generacion, ke ili neniam forgesu la pasintan amaron kaj elvoku el ili pli grandan revolucian energion por plirapidigi la socialisman konstruadon de la montregiono.

*Paŝtejo de la komunumo*



AN TONGVEN:

# Inter nova kaj malnova kadroj

La afero okazis en la Ĝenerala Fabriko de Metalurgiaj Maŝinoj de la urbo Tongling de Anhuj-provinco de nia lando.


Antaŭ tri jaroj ĉirkaŭ 29-jara laboristo Vu Congŝu eklaboris kiel sekretario de la partia komitato de la fabriko kaj estro de la revolucia komitato dum malnova kadro Ĝang Ĝangfa fariĝis vicsekretario de la partia komitato.

Antaŭ pli ol dek jaroj, kiam Vu Congŝu eklaboris kiel metilernanto en la fabriko, Ĝang Ĝangfa jam laboris kiel estro de la fabriko kaj vicsekretario de ĝia partia komitato. Nun Vu Congŝu prenis la unuan gvidan lokon de la partia komitato. Oni timis, ke li ne povas bone plenumi sian laboron pro juneco kaj manko de sperto, kaj ke la malnova kadro Ĝang Ĝangfa ne ĝojas en la koro pro tio, ke la juna kadro superis lin kaj fariĝis sekretario.

Fakte, tiu timo estis senbaza. Ĝang Ĝangfa opinias ke kulturado de novaj kadroj estas grava rimedo por fortigi la partian konstruadon kaj kulturi daŭrigantojn por la afero de la Partio. Vu Congŝu estas unu el la multnombraj novaj kadroj emerĝintaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj havas relative altan konscion de la dulinia batalo,



*Fariĝinte sekretario de Partia Komitato de sia fabriko, Vu Congŝu ankoraŭ persiste partoprenas por certa tempo en sia antaŭa laborgrupo.*



*Vu Congŝu (dekstre) kaj Ĉang Ĉangfa interŝanĝas komprenajon en lernado.*

diligentecon en studado, kuraĝon en laboro kaj povas profundiĝi en la amasojn. Kvankam al li mankas sperto, tamen li povas iom post iom akumuli ĝin dum laborado. Ĝang Ĝangfa pensis, ke kiel malnova kadro multjare edukita de la Partio, li devas konscie respekti, subteni kaj helpi Vu Congŝu por ke la lasta bone unuiĝu kun ĉiuj membroj de la partia komitato por kune gvidi la amason en administrado de la fabriko.

Ĝang Ĝangfa laboris jam pli ol 20 jarojn en la Ĝenerala Fabriko de Metalurgiaj Maŝinoj kaj bone konas ĉion de la fabriko. Pro tio la maljunaj kamaradoj de la fabriko tre respektas liajn opiniojn. Kaj pro tio li donis apartan atenton por ĝuste sinteni kaj respekti Vu Congŝu, persistante en la principo de demokratia centralizismo de la Partio. Ĝang Ĝangfa ĉiam klare esprimas sian subtenon al ĉiu ĝusta opinio elmetita de Vu Congŝu. Li ofte aktive helpas lin en esplorado kaj analizado de problemoj kaj kuraĝigas lin pli bone labori. Eklaborante kiel sekretario, Vu Congŝu estis iom singêna antaŭ la maljunaj kamaradoj. Tion rimarkinte, Ĝang Ĝangfa varme lin kuraĝigis kaj esprimis sian decidon bone kunlabori kun li. Post nelonge, kiam Vu Congŝu fariĝis sekretario, la partia komitato devis fari raporton al la laboristoj kaj oficistoj. Vu Congŝu proponis ke Ĝang Ĝangfa faru ĝin. Sed Ĝang Ĝangfa kuraĝigis lin mem fari la raporton. Subtenate de la maljunaj kamaradoj Vu Congŝu unuafoje faris raporton en la nomo de la partia komitato al la tuta fabriko.

En laboro Ĝang Ĝangfa ĉiam kaj ĉie metas la partiajn interesojn en la unuan lokon, sin tenas modeste kaj prudente kaj tre respektas la junan sekretarion de la partia komitato. Krom sekretario de la partia komitato de la fabriko, Vu Congŝu estas ankaŭ unu el la gvidantoj de la urbo kaj ofte ĉeestis kunvenojn. Kiam Ĝang Ĝangfa devas fari ion gravan en la fabriko, eĉ dum foresto de Vu Congŝu, li telefonas aŭ skribas al li kaj sincere petas opiniojn de la juna sekretario. Iufoje Vu Congŝu vizitis kurson de la provinco por studi verkojn de Marks kaj Lenin. Ĝang Ĝangfa kaj aliaj membroj de la partia komitato diskutis pri projekto de organiza reformo de la fabriko. Kiam oni estis sendonta ĝin al la supera instanco por sankciado, Ĝang Ĝangfa diris: "Tio estas grava afero, ni devas aŭskulti opiniojn de la sekretario de la partia komitato." Liaj vortoj atentigis la aliajn komitatanojn, kaj ĉiuj unuanime konsentis lian opinion. Ĝang Ĝangfa speciale veturis al la ĉefurbo de la provinco por konsiliĝi kun Vu Congŝu. Tiuvespere ili interkonsiliĝis ĝis profunda nokto.

Vu Congŝu estas energiplena kaj kuraĝas pensi kaj agi en laboro. En la lasta duono de 1971 la fabriko faris planon fabriki 16 ilmaŝinojn antaŭ la jarfino. Vu Congŝu faris esploradon kaj enketadon en laborejoj kaj elmetis proponon plenumi la taskon je du monatoj antaŭdate laŭ la aktiveco de la laborista amaso. Tiam gvida kadro de iu laborejo pensis en si: Ĉu ĝusta estas la opinio de la nova sekretario kun malmulte da administra sperto? Li trovis Ĝang Ĝangfa kaj diris al li sian

opinion. La lasta opiniis ke kvankam iuj laborejoj eble renkontos malfacilojn en produktado laŭ la propono de la sekretario, tamen la propono estas produktita post enketo kaj esplorado kaj konformas al la spirito de la ĝenerala linio **streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie.** La opinio de tiu ĉi kadro montras, ke li ankoraŭ ne tute fidas al la juna sekretario. Ĝang Ĝangfa senŝanceliĝe montris sian subtenon al la sekretario, konkrete analizis la favorajn faktorojn por plenumi la taskon kaj edifis lin respekti kaj subteni la sekretarion en laboro. Dank' al la unuiĝo kaj klopodo de la laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko la tasko de fabrikado de 16 ilmaŝinoj estis antaŭdate plenumita laŭnorme.

En laboro, la nova sekretario iam ankaŭ eraris pro manko de sperto. Ĝang Ĝangfa ĉiam ĝustatempe atentigis kaj sincere helpis lin. Foje pro bezono en laboro oni volas transpostenigi unu laboriston el iu laborejo. Vu Congŝu sola decidis tion post esploro. Tion sciinte, Ĝang Ĝangfa iniciate interŝanĝis opinion kun li kaj montris al li, ke li eraris farante sola tiun decidon sen kolektiva diskuto kaj konsento de la partia komitato kaj traktado de la personara fako. Tio estas eraro de organiza principo. Vu Congŝu akceptis tiun kritikon. De tiam li konstante avertas sin per tio kaj edukas la kadrojn pli konscie efektivigi partian demokratian centralizismon.

Vu Congŝu rapide progresas sub la gvido de la supera partia komitato, helpo de maljunaj kamaradoj kaj dank' al sinhardado en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. Kaj ankaŭ la revolucia kaj produkta situacio de la fabriko estas tre bona. En la lastaj tri jaroj la fabriko antaŭdate plenumis ĉiujaran planon de la ŝtato. Ankaŭ la malnova kadro Ĝang Ĝangfa multe progresis en la kunlaboro kun Vu Congŝu. Iun fojon la supera instanco asignis al ili taskon fabriki 100 ilmaŝinojn. Ĝang Ĝangfa opiniis, ke oni povas produkti nur 50 ilmaŝinojn. Vu Congŝu esprimis sen ŝanceliĝo; ke oni certe povas plenumi la taskon en difinita tempo analizinte diversajn kondiĉojn. Poste dank' al mobilizo de la amaso 120 ilmaŝinoj estis fabrikitaj. De la nova sekretario Ĝang Ĝangfa ellernis du punktojn: Unue, por revolucio oni devas havi tre grandan energion; due, esploro kaj enketo estas la premiso kaj garantio por efektivigi ĝustan gvidadon. Ĝang Ĝangfa diris, ke mankas al li ĝuste la fortaj punktoj de la nova sekretario. Li esprimis ke li nepre modeste lernos de la sekretario, pli bone praktikos la linion kaj politikojn de la Partio kaj klopodos por bone plenumi sian laboron.

## Kurantaj Aferoj

### NOVA SUKCESO EN KURACO DE KORIOKANCERO KAJ MALIGNA MOLO

Koriokancero estas ege maligna tumoro por virinoj. Ĉe plejparto de la kazoj, la pacientino rimarkis sian malsanon nur kiam la kancero jam disvastiĝis kaj fariĝis nekuracebla. Aplikante la metodon ĉefe uzi grandan dozon da kemiaj kontraŭkanceraj medikamentoj kaj helpe al tio ankaŭ operacion, kuracistoj de la Ĉefurba Hospitalo sub la Ĉina Medicina Akademio en Pekino altigis kuracefikon kaj eĉ sukcesis resanigi lastperiodajn pacientinojn kun kanceroj disvastiĝintaj al la pulmoj aŭ serioze disvastiĝintaj al la cerbo, hepato, reno k.a. organoj. De 1958 ĝis 1970, la hospitalo akceptis 296 malsanulinojn de koriokancero. La pocentoj de mortintoj el tiaj malsanulinoj reduktiĝis de 90 en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 29.2. La pocentoj de mortintoj el la 312 akceptitaj malsanulinoj de maligna molo, reduktiĝis de 25.9 en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 1.8 kaj en la lastaj du jaroj jam neniu malsanulino de tia kazo mortis. Post longa observado post elhospitaliĝo iuj malsanulinoj jam vivis 10 aŭ 14 jarojn kaj jam reakiris sian sanon.

En la pasinteco la sola metodo por kuraci la du malsanojn estis amputi la uteron. Nun post la esplorado de tiu hospitalo, oni aplikas nur medikamentan kuracon por konservi la uteron al unuaperiodaj malsanulinoj, kiuj estas junaj kaj deziras konservi al si naskipovon. Post elhospitaliĝo multaj el tiuj malsanulinoj jam naskis infanon kaj iuj el la infanoj jam havas pli ol 10-jaran aĝon.

ĴEN TONG-JUAN:

# Giaŭ Ŝunfa en apliko de akupunkturo al kranihaŭto

ANTAŬ unu jaro, Pan Jinggjuan subite febris, falis en letargio kaj post kelktaga alta febrado ŝi blindiĝis, perdis parolpovon kaj ŝiaj membroj paraliziĝis. La gepatroj de Jinggjuan opiniis, ke la infano jam estas nekuracebla. Tamen post kuracado de Giaŭ Ŝunfa, neŭrokirurgo de la Popola Hospitalo de Giŝan-gubernio de Ŝanhi-provinco, per apliko de akupunkturo al la kranihaŭto, unue la okuloj de Jinggjuan ekbrilis kaj la pupiloj komencis vigle moviĝi kaj poste ŝi sidiĝis kaj ekpovis paroli. Post malpli ol unu monato, ŝi jam povis ellitiĝi kaj ludi. Kiel do Giaŭ Ŝunfa trovis la terapion de akupunkturo al kranihaŭto?

## INSPIRO

En praktikado de neŭrokirurgio, Giaŭ Ŝunfa ofte akceptis pacientojn de neŭrologiaj malsanoj kiaj paraliziĝo, sensentiĝo kaj tremado kaj por liberigi ilin de la suferoj, li faris ĉion eblan kaj iam eĉ laboris ĝis profunda nokto.

En vintra nokto de 1970, kiam Giaŭ Ŝunfa interbabilis kun pli-ol-70-jara komunumanino Onklino Ĝang, li informiĝis, ke ŝi suferis de sensentiĝo de la membroj jam pli ol 20 jarojn kaj kelkiam ili tiel doloris al ŝi, ke ŝi eĉ ne povis endormiĝi. Malgraŭ tio Onklino Ĝang partoprenis en kolektiva laboro kiel kutime por krei riĉaĵojn por socialismo. La nobla spirito de Onklino Ĝang profunde kortuŝis Giaŭ Ŝunfa kaj kiel li deziris resanigi ŝin! De tiam, Giaŭ Ŝunfa diligente studis teorion de akupunkturo, modeste lernis terapion de nova akupunkturo por serĉi efikan terapion por kuraci neŭrologiajn malsanojn.

En la komenco Giaŭ Ŝunfa kuracis paralizulojn per apliko de akupunkturo al ilia korpo, je la tradiciaj pikpunktoj por kuraco de paraliziĝo, ĉu ili suferis de supra-neŭrona paraliziĝo aŭ de malsupra-neŭrona paraliziĝo. Praktikado montris, ke tia terapio efikis malpli bone por supra-neŭrona paraliziĝo. Kie do kuŝas la kaŭzo? Iutage Giaŭ Ŝunfa studis la filozofian verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro.* Prezidanto Maŭ montras: "**Ĉiu ajn movadformo havas en si propran partikularan kontraŭdiron. Tiu partikulara kontraŭdiro konsistigas la partikularan esencon kiu distingas unu objekton de la aliaj.**" Tiuj vortoj forte inspiris lin. Li pensis: Kvankam supra-neŭrona paraliziĝo kaj malsupra-neŭrona paraliziĝo havas similajn simptomojn, tamen diferencaj estas la kaŭzoj de ili, nome tiu de la antaŭa estas en la cerbo dum la alia estas en la malsupraj neŭronoj. Kontraŭdiro de malsama naturo devas esti solvita per malsama rimedo. La supra-neŭrona paraliziĝo estas kaŭzita de malsaniĝo de cerbo. Ĉu pli bonan kuracan efikon oni povas atingi per piko al punktoj pli proksimaj al la cerbo? Sekve Giaŭ Ŝunfa ekhavis la ideon serĉi incitajn areojn sur kranio por kuraci supra-neŭronan paraliziĝon.

## PRAKTIKADO

Giaŭ Ŝunfa legis multajn medicinajn verkojn kaj materialojn. Laŭ la ĉina medicina teorio de *ĝingluo*, estas malmultaj pikpunktoj uzeblaj por kuraci paraliziĝon. Kiel do oni povas kuraci supra-neŭronan paraliziĝon per pikado al kranihaŭto? Li iom malesperiĝis. Tiam, la partia filio kuraĝigis lin studi la verkon *Pri Praktiko* de Prezidanto Maŭ. En la studado li ekkonis, ke praktikado kondukas al vera kono kaj oni povas koni aferojn nekonatajn per praktikado. Sekve do li provis pikadi sian kranihaŭton per arĝenta pinglo antaŭ spegulo.

Kranihaŭto enhavas multajn nervojn kaj angiojn kaj pikado al ĝi kaŭzas neeltenеblan doloron. Kun kunpremitaj dentoj li daŭre pikis dekfoje, centfoje... Kvankam li eltenis grandan doloron dum provpikado en pluraj tagoj, tamen li sentis nur elektrofrapon kaj ŝveliĝon en parto de krani-

haŭto, sed nenion alian en la aliaj partoj de lia korpo.

Sen teoria bazo kaj apero de la atendita piksento, ĉu la ideo devas esti forlasita? Ne, sub la gvido de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ, Giaŭ Ŝunfa obstine serĉanta veron por protekti la sanon de la popolo ne volas frivole deklari sian provon fiaska. Li daŭre ĉerpis saĝon el la verkoj de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ instruas nin: **"Sen konkreta analizo ne eblas koni la karakteron de ia ajn kontraŭdiro."** Kamaradoj atentigis lin, ke pro malsameco de la internaj kondiĉoj, malsamaj korpopartoj montras malsaman sentemecon al pikado. De tiam li aparte atentis pri reago de la pacientoj je pikado. Foje li kuracis pacienton de hemikranio. Li pikis lin je punkto sur unu flanko de lia kapo kaj la paciento sentis ne nur mildiĝon de la kapdoloro sed ankaŭ varmiĝon je lia buŝangulo. Tiu kazo montris, ke piko al kranihaŭto povas kaŭzi piksenton ne nur sur ĝi, sed ankaŭ en aliaj korpopartoj. Tio forte stimulis Giaŭ Ŝunfa kaj havigis al li novan esperon, kaj li decidis fari pliapaŝan pruvon en klinika praktiko.

Iutage, Onklino Jin petis Giaŭ Ŝunfa, ke li resanigu ŝin de paraliziĝo. Post ekzameno li trovis la kaŭzon de ŝia paraliziĝo. Li oblikve pikis en kranihaŭton de la pacientino, turnadis la pinglon je unu minuto kaj tiam la pacientino sentis ke varma fluo etendiĝis ĝis la manfingroj kaj piedfingroj de la malsana flanko; post triminuta pingloturnado, plifortiĝis la varmfluo kaj la malsanaj membroj sentis komforton; post eltiro de la pinglo, la antaŭe paraliziĝinta brako jam povis leviĝi super la kapon kaj la malsana gambo jam povis iri. Tiel emociiĝis la pacientino, ke ŝi larmis.

## ALTIĜO

Post la unua sukceso en akupunkturo al kranihaŭto, Giaŭ Ŝunfa kaj liaj kamaradoj faris pruvadon pri ĝi en klinika praktiko kaj trovis unu post alia plurajn pikareojn. Kliniko postulis, ke ili klare determinu la pikareojn por kuraci koncernajn malsanojn. Por tion fari oni devis resumi la spertojn kaj levi perceptan konon al racia kono.

En kvieta malsanula ĉambro, aplikante akupunkturon al kranihaŭto de la paciento, Giaŭ Ŝunfa detale notis la ŝanĝiĝon de la sanstato de la paciento por pretigi bazon por determino de pikareoj de kranihaŭto. En la kuracista oficejo, Giaŭ Ŝunfa atenteme legis referencajn materialojn por trovi teorian bazon por la determinado. Sub lamplumo, Giaŭ Ŝunfa korektadis la pikareojn de kranihaŭto laŭ la opinioj de la kamaradoj. Kiom da kazoj Giaŭ Ŝunfa kaj liaj kamaradoj analizis, kiomfoje ili interkonsiliĝis kaj kiom da sendormaj noktoj ili pasigis por determini la pikareojn! Nun la pikareoj estas finfine determinitaj kaj grafikaĵo pri ili estas presita.

La sukceso de la kranihaŭta akupunkturo alportis esperon al la malsanuloj de supra-neŭronaj malsanoj kiaj paraliziĝo, sensentiĝo, afazio, blindiĝo, tremado kaj ĥoreo kaj ĝi estas varme akceptata de la vastaj popolamasoj. La Popola Hospitalo de Giŝan-gubernio tuj starigis fakon kaj malsanulĉambrojn de kranihaŭta akupunkturo kaj fondis kursojn de tiu terapio en la tuta gubernio, kaj dank' al tio ĝi rapide disvastiĝis.

Por pliapaŝe esplori tiun terapion, Giaŭ Ŝunfa kaj liaj kamaradoj kune studis diligente, praktikadis senĉese kaj trovis unu post alia novajn pikareojn sur kranihaŭto, tiel ke oni povas apliki kranihaŭtan akupunkturon ankaŭ por malsanoj de aliaj fakoj.

Surbaze de akupunktura anestezo, Giaŭ Ŝunfa esploris la regulon de anestezo per kranihaŭta akupunkturo utiligante sian sperton pri sendolorigo per kranihaŭta akupunkturo kaj akiris ĝojindan sukceson. Sukcesis 93 procentoj de la faritaj 316 operacioj helpe de anestezo per kranihaŭta akupunkturo. Tiuj kazoj apartenis al pli ol 30 specoj inkluzive de amputo de mamglanda kancero kaj amputo de stomako kaj utero.



# Kamparanino-pentristino

(*Raportaĵo*)

ESTIS aŭtuno. Sur Vejhe-ebenaĵo etendiĝas senlima kotona maro. La kotonlanugoj similaj al arĝentaj floroj blankas kiel neĝo.

Krakas la vipo kaj trotas la ĉevaloj. Iu junulo kun granda pajlĉapelo sur la kapo, en jako nebutonumita, gaje kondukas antaŭen ĉaron kun pneŭmatikaj radoj plenan de kotono. 6-7 junulinoj, kiuj ĉiuj tiras po ĉareton plenan de kotono, sekvas la ĉaron per grandaj paŝoj kvazaŭ ili konkursus kun la ĉaro.

Fore sur la kotonkampo, amaso da knabinoj kotonkolektantaj en koloraj vestoj rigardas la senĉesan fluadon de ĉaroj kaj ĉevaloj por aktive liveri kotonon al la ŝtato, rido trakuras ilian vizaĝon kaj ankaŭ ili konkuras unu kun alia....

Kiel kortuŝa bildo!

Jes, tio estas bildo pentrita.

Tiu ĉi novjara bildo kun titolo *Gaja Kolekto de Nova Kotono* ricevis laŭdojn de la rigardantoj en la Tutlanda Ekspozicio de Belartaj Verkoj en 1972, pro sia klara kaj gaja tono kaj forte emocia vivospiro.

La verkinto de la bildo estas ordinara kamparanino Li Fenglan, malriĉkamparanino-komunumanino de Hihancun-brigado, Guangming-komunumo, Huhian-gubernio, Ŝenhi-provinco.

## I

Iun matenon en vintro de 1958, kelkaj kadroj de Guangming-komunumo de Huhian-gubernio rompis al si la kapon pro informilo sendita de la gubernia registaro.

"Ĉu pentremulo estas bezonata?"

"Ve, malfacile trovebla estas tia homo!"

Por propagandi la situacion de la granda antaŭensalto, la gubernia instanco decidis fondi amatoran belartan kurson en la konstruejo de Ganju-akvorezervejo, por ke la kursanoj kaj laboru kaj pentru. La gubernia instanco postulis ke ĉiu komunumo rekomendu al la kurso unu aŭ du komunumanojn kun iom da fundamenta belarta scio. Ĝuste pri tiu afero interkonsiliĝis kadroj de la komunumo.

Subite, enkuris virino kvazaŭ vento.

"Kamarado komunumestro, mi volas min anonci!"

"Ho, Li Fenglan, por kio do?"

"Por lerni pentradon!"

"Ha-ha!" ekridis la komunumestro kaj diris, "longaj estas viaj oreloj. Kiel vi informiĝis pri tio laborante en la tajlora grupo?"

"Al la alvoko de la Partio mi devas aktive respondi!" Li Fenglan respondis kun sonora rido.

"Por ĉio vi vin anoncas la unua, vera aktivulino vi estas!" Rigardante la aktivulinon en la komunumiga movado, la komunumestro ŝerce diris: "Vi povas fari papertranĉaĵojn por ornami fenestrojn kaj tajli vestojn, ĉu ankaŭ pentradon vi povas fari?"

"Jes! Kio estas nelernebla?" respondis Li Fenglan kun memfido.

"Ĉu vi iam vizitis lernejon kaj scipovas legi? Por fari pentradon oni devas almenaŭ havi iom da fundamenta scio de kulturo!"

Viziti lernejon? Pri tio Li Fenglan ne sciis kion respondi. Se ŝi dirus, ke ŝi iam vizitis lernejon, fakte en la malbeninda malnova socio, ŝia familio eĉ ne povis plenigi ŝian stomakon, de kie do ĝi akiru monon por ŝia vizitado al lernejo? Se ŝi dirus, ke ŝi neniam vizitis lernejon, ankaŭ tio estas ne prava. Post la Liberiĝo, ŝi iam vizitis vintran lernejon kaj kontraŭanalfabetan kurson. Ŝi eĉ gajnis la unuan premion pro bona lernado....

Vidinte ke Li Fenglan meditas, la komunumestro tuj ŝanĝis sian diron: "Ne gravas se vi ne vizitis lernejon...."

"Mi vizitis lernejon, komunumestro," subite Li Fenglan levis sian kapon kaj diris firmdecide, "Mi vizitis vintran lernejon kaj scipovas legi!"

La komunumestro ĝoje diris: "Bone, ni do sendos vin bravulinon tien por lerni!"

La partia komitato de la komunumo rapide sankciis la postulon de Li Fenglan por lerni pentradon. Ŝi sentis koran ĝojon kaj farinte aranĝon pri siaj infanoj, ŝi ekmarŝis unuafoje kun tornistro sur la dorso malproksimen al la konstruejo de Ganju-akvorezervejo.

En la lasta tagdeko de decembro, la vetero jam estis tre malvarma. Sed la bolanta konstruejo estis kvazaŭ arda fandejo por Li Fenglan. Sur la konstruejo flirtis ruĝaj flagoj, regis tumultado kaj tondris mineksplodoj....

Li Fenglan, kiu laboris de sia infaneco surkampe kun sia patro, unuafoje vidis tiel ardan kaj grandiozan laboran scenon, de tio ŝia koro neniel povis kvietiĝi.

Ĉiutage post streĉa laborado, ekfunkciis la amatora belarta kurso. La unua leciono estis pri la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.*

**"Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj."** Ĉiu frazo kaj ĉiu vorto lumigis la koron de Li Fenglan.

"Prave, ni nepre devas pentri laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn!" Ju pli multe lernis Li Fenglan, des pli ŝi emociiĝis, kaj des pli klariĝis ŝia menso. Forta kreemo inspiris ŝin ekpreni penikon. Ne estis tablo sur la konstruejo, ŝi do anstataŭigis ĝin per pordoklapego. Kiam malvarmiĝis ŝiaj manoj, ŝi blovis al ili varmon. Post kelkaj tagoj sukcesis la unua pentraĵo de Li Fenglan pri heroaj popolaj volontuloj en konstruado titolita *Herooj Bridis Drakon.*

Je ventoblovo susuras ĉiuj folioj. Tiu ĉi afiŝbildo tuj vekis laŭdojn ĉe la rigardantoj. Kompreneble, ĝi neeviteble havis nemalmultajn difektojn, tamen, ĝia grandiozeco tuj altiris la atenton de la rigardantoj.

## II

"Homoj okupataj ĉiam sentas la tempon mallonga." Porpasis vintroj kaj someroj, kaj je palpebrumo jam venis la jaro 1964.

En tiu jaro, la granda socialisma eduka movado komenciĝis en la ĉina kamparo. Ankaŭ Li Fenglan aktive sin ĵetis en la movadon.

Iutage, Li Fenglan venis al la sekretario de la partia filio kaj meminiciate petis laboron.

"En la ĉirkaŭaj vilaĝoj oni pentras bildojn pri la historio de sia vilaĝo kaj familio, ankaŭ ni tion faru!"

"Bona ideo! Nun iuj junuloj scias nur la dolĉecon de la nuntempo sed ne amarecon en la malnova socio. Vi do bone pentru!" Kontente aprobis ŝin la sekretario.

Helpate de elementa lernejano, Li Fenglan komencis fari vizitadon al la antaŭe malriĉaj familioj. Ŝi elmetis demandojn kaj la lernejano notis la rakonton.


Maljunulo Vang Fu vendis sian infanon; Ŝeng Venhiang laboris ĉe bienulo kiel jardungito dum pli ol 30 jaroj; la patrino de Juĝu kolektis velkajn tigojn en sia infaneco kaj unu el ŝiaj brakoj estis rompita de bienulo; Pan Fujang estis vekte alportita de sia patro de Hubej-provinco, kaj poste lia patro mortis en templo....

Aŭskultante tiujn sangajn kaj larmajn historiojn, Li Fenglan neretenenble elverŝis larmojn. Kvankam ŝi ĉiutage renkontis ilin, tamen nur nun ŝi pli bone komprenis iliajn pensojn, sentojn kaj internan mondon. Ho, ĝuste pro tio ili estas rigardataj kiel kolonoj de la produkta grupo, ĉar en ilia koro brulas flamo de amo al la nova socio! Mi devas pentri bildojn pri la familia historio de tiuj ĉi klasaj fratoj!

Li Fenglan pentris kaj pentradis, de mateno ĝis vespero. Meznokte kiam la aliaj endormiĝis, ŝi ellitiĝis kaj denove komencis pentri kun jako kovranta la dorson.

Kunveno por rememori pasintajn suferojn okazis en la vilaĝo. En la kunvenejo pendis bildserioj pri familiaj historioj pentritaj de Li Fenglan. La komunumanoj kun siaj infanoj ĉirkaŭis la bildojn. Ili rigardis la bildojn kaj akuzis la malnovan socion, kaj iuj ekploregis antaŭ la bildserio pri sia familia historio. La larmoj klarigis la okulojn de la amaso. Jes, vere **"nur socialismo povas savi Ĉinion"**! Ili do sin levis por ataki la kapitalisman forton.

Post la komenco de la granda kultura revolucio, kun granda indigno Li Fenglan sin ĵetis en la ardan batalon. Ŝi pentris freskojn kaj prezentis lumbil-



*Li Fenglan (dekstre) pentras grandan freskon.*

dojn por varme propagandi Maŭzedongpenson kaj forte kritiki la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝoŭki kaj la similaj. Ĝuste en la momento kiam streĉe iris la batalo inter la du linioj, iu malbonulo, kiu estis centfamiliestro antaŭ la Liberiĝo, kaŝe agitis la amason kun vana espero subfosi la kulturan revolucian movadon de la vilaĝo. Kaj tiuj kiuj ne konis lian veran intencon, estis trompitaj kaj tumultis sekvante lin. Vidinte tion, Li Fenglan forte maltrankviliĝis. Ŝi decidis malkaŝi la veran vizaĝon de la postkulisa agitanto per sia peniko por retiri de sur la erara vojo siajn klasajn fratojn.

Iutage, kiam Li Fenglan tagmanĝis, komunumano Ŝen Ĝijong alvenis. Enirinte li haste diris: "Fenglan, pentru por mi kelkajn bildojn!"

"Kiajn bildojn vi volas?"

"Vi pentru kiel la centfamiliestro subpremis mian patron!"

Kaj Ŝen Ĝijong detale rakontis al ŝi kiel la centfamiliestro en la pasinteco kruele torturis lian patron.

"Bone!" Tio estas ĝuste "obusoj" tre dezirataj de Li Fenglan.

Post kiam tiuj "obusoj" estis pafitaj al la centfamiliestro, la aroganteco de tiu lasta falis. Tion vidinte, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris kun ĝojo: "Prave, oni devas malkaŝi la pasintajn krimojn de tiu kanajlo!" Iu junulo trompita de la aĉulo ekploregis tuj post kiam li vidis la pentraĵojn.

De tiam, pli kaj pli ardiĝis la flamo de revolucia kritiko de Hihancun-vilaĝo.

## III

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio Hihancun ricevis novan fizionomion. La vilaĝanoj

*Printempa Festo*

*Papertranĉaĵo*
*de*
*Lin Dajhua*




## Kurantaj Aferoj

### KUNA ESPLORADO DE ĈINA KAJ USONA SCIENCISTOJ PRI CITOLOGIO KAJ GENETIKO

Novajn sukcesojn atingis la kuna esplorado pri citologio kaj genetiko fare de profesoro de biologio Tong Diĝoŭ de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj usona ĉino Prof. Mangiang Niu, sciencisto de Temple-universitato de Usono.

Pri diferenciĝo, evoluo kaj heredo de ĉelo, la nuna ĝenerala teorio opinias, ke la citoplasmo estas regata de la nukleo kaj la diferenciĝo, evoluo kaj heredo de ĉelo estas regata de la nukleo en la fekundigita ovolo. En sia longa esplorado Tong Diĝoŭ konstatis, ke multaj fenomenoj de genetiko estas rezultato de reciproka influo de nukleo kaj citoplasmo. En multfojaj eksperimentoj de embrio Mangiang Niu trovis, ke la cibernetikaj ribozo kaj nuklea acido en citoplasmo estas la ĉefaj substancoj akcelantaj al diferenciĝon kaj evoluon de ĉelo.

En 1972 Prof. Mangiang Niu venis al Ĉinio por viziti siajn parencojn. Li informiĝis pri la esplorado de Tong Diĝoŭ kaj esprimis sian deziron esplori kune kun Tong Diĝoŭ en mallonga tempo. En majo de 1973 li refoje venis al Ĉinio laŭ invito por kune esplori.

En eksperimentoj pri karasoj kaj orfiŝoj ili pruvis, ke cibernetikaj ribozo kaj nuklea acido en citoplasmo de ovujo havas evidentan influon al heredo.

# Aktivado sur Glacio en Harbino



Arta sketado




Angulo de sketejo



Skiado

Hokeo sur glacio








Skiistinoj



Pli bele ol en printempo.

Sketejo





Industriaj konstruajoj skulptitaj el glacio



Glacia ponto

LONG ĴENHJUAN:


# Harbino — fama urbo de nordorienta Ĉinio


HARBINO estas la ĉefurbo de nia Helonggiang-provinco, kun areo de pli ol 1,300 kvadrataj kilometroj kaj ĉ. 2,300,000 loĝantoj. La rivero kaj ŝoseoj multe faciligas ĝian trafikon, kaj la fer-kaj aer-vojoj ligas ĝin kun la aliaj lokoj de la patrolando. La urbo famiĝas pri siaj movforta kaj maŝinfabrika industrioj tra la tuta lando.

Antaŭ 75 jaroj Harbino estis nur vilaĝo kun dekkelkaj fiŝistaj familioj. Antaŭ la Liberiĝo ĝi estis tipa konsuma urbo kun tre postiĝinta industrio. La malnova Harbino estis edeno de imperiistoj kaj koloniistoj por luksa kaj diboĉa vivo kaj someruma loko por militaristoj, burokratoj kaj kompradoroj, sed la laboranta popolo ĝemadis en mizero.

Post la Liberiĝo, sub prilumado de Maŭzedong-penso, Harbino spertis profundan ŝanĝiĝon. La konstrua areo de la urbo pligrandiĝis je 1.5-oblo kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. Nun tie kuŝas larĝaj kaj puraj asfaltitaj stratoj, kun vicoj post vicoj da fabrikaj kaj aliaj domoj starantaj ambaŭ-

*Gvidanto kaj laboristoj de la Harbina Elektromaŝina Fabriko interkonsiliĝas pri produktado.*





*Laboristoj kaj teknikistoj de la Harbina Vaporturbina Fabriko kontrolas grandan maŝinparton.*

flanke. Somere ĝi servas kiel someruma loko kaj vintre ĝi ĉie ĉarmas per sia neĝa kaj glacia pejzaĝo. Ambaŭflanke de la strato Daking en ĝia antaŭurbo, kie antaŭe estis diboĉejoj kaj ĉevalkonkursejo por imperiistoj, altranguloj kaj riĉuloj, nun konstruiĝis tri grandaj fabrikoj de kaldronegoj, elektromaŝinoj kaj turbinoj.

Disvolvante la revolucian spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj luktado en malfaciloj, la harbina popolo faris sian kontribuon en konstruado de tiu moderna socialisma urbo. Ĉu la skalo kaj rapideco de industrio aŭ la kvalito kaj specoj de ĝiaj produktaĵoj, precipe en disvolvo de la movforta industrio, senkompare superis tiujn antaŭ la Liberiĝo. Ekzemple, la 20-jara totala produktokvanto de la Harbina Elektromaŝina Fabriko superis je 8-9-oblo la totalan kapaciton de tiuj instalitaj dum centoj da jaroj en la malnova Ĉinio. En pli ol unu jaro depost sia finkonstruiĝo la Harbina Kaldronega Fabriko sukcese provfabrikis la unuan altpreman kaldronegon por 50,000-kilovata generatora kompleto.

Sub la direktado de la ĝenerala linio **"streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie"**, la harbinaj laboristoj forte kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj sukcese provfabrikis grandtipan akvoturbinan generatoran kompleton en plej mallonga tempo. Ili starigis teknikan grupon kun partopreno de laboristoj, teknikistoj kaj gvidaj kadroj por fari projektadon, eksperimentadon kaj plibonigon samtempe kaj plenumis tutan projekton de grandtipa akvoturbina generatora kompleto en nur pli ol unu jaro. La bazo de tiu kompleto pezis pli ol 100 tunojn, kaj oni devis turni ĝin por veldado kaj prilaborado, sed tiam la fabriko havis rulponton nur kun levpovo de 75 tunoj. Por venki la malfacilon, la veldistoj ne timis ardajn fajrerojn kaj feraĵerojn, kaj faris demalsupran veldadon sen turno de la maŝina bazo. Kiam oni prilaboris la ŝafton de la generatoro, ili subite trovis ĝian internan truon nenorma en tekniko. Tiam maljuna laboristo Ĝaŭ Deji rampis en la truon kaj regulis la tranĉilon por garantii altan kvaliton de la ŝafto.

Samtempe kun la disvolvo de la movforta kaj maŝinkonstrua industrioj, Harbino ankaŭ konstruis fabrikojn de ĉiutage bezonataj kemiaĵoj, vitraĵoj, plastaĵoj, kaŭĉukaĵoj, ledaĵoj, sukero, medikamentoj kaj tekstilado. Nun la diversaj industriaj produk-

taĵoj de Harbino jam superis mil specojn, inter kiuj sin trovas grandtipaj ekipaĵoj miltunaj por minejoj kaj metalurgio, kaldronego de elektra centralo kun alteco de 8-9-etaĝa domo, borileto malpli granda ol broda pinglo, elektra fadeno malpli dika ol haro, ŝtala globeto kun grandeco de milia grajno, mezuriloj kaj mezurinstrumentoj kun alta precizeco kaj diversaj ĉiutagaj bezonaĵoj. Krome, plurspecaj metiartaĵoj produktitaj de Harbino, kiaj bildoj faritaj el pecoj de tritika tigo aŭ bovkorno, havas grandan debiton en kaj ekster la lando.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, Harbino jam provizis pli ol 20 provincojn, urbojn kaj aŭtonomajn regionojn per multaj kompletaj elektraj ekipaĵoj por hidroelektrejoj kaj termoelektrejoj, liveris altprecizajn mezurinstrumentojn kaj altrapidajn [lagrojn al la aŭtomobiloj "Hongki" kaj kamionoj, fabrikis por Daking-olekampo ekipaĵojn por eksplutado kaj rafinado kaj subtenis la Anŝan-an Ferŝtalan Kompanion per maŝinoj por grandtipa minejo. Dume la harbinaj laboristoj produktis por frataj landoj centojn da specoj de elektromaŝinoj, malpezindustriaj kaj kemiaj produktaĵoj.

Harbino estas en marŝado. En la urbo ĉie prezentiĝas plena juneco kaj prospereco.



*Ni Hiulian (la tria de dekstre) laboristino de la Harbina Globlagra Fabriko, estas labormodelo de Harbino.*

## Kurantaj Aferoj

### NOVA PETROLREGIONO DE DAKING-PETROLKAMPO


En oktobro de 1973 nova petrolregiono de Daking komencis ŝprucigi nafton.

En la eksplutado kaj konstruado de la nova petrolregiono, laboristoj disvolvis la revolucian stilon de Daking kaj obeis la unuecan komandon de la konstruejo. Ili perfektigis la regularojn de kvalita kontrolado kaj deĵorŝanĝo, dank' al kio multe altiĝis la kvalito kaj rapideco de la konstruado kaj post 3 monatoj nafto jam komencis ŝpruci en la regiono.

### NATURA GASO EN SIĈUAN-PROVINCO

Pri trovo kaj utiligo de natura gaso en Siĉuan-provinco oni povas legi en la historia literaturo antaŭ pli ol 2,200 jaroj. Antaŭ pli ol 1,800 jaroj oni jam boris gasputon kaj antaŭ 600 jaroj oni jam komencis utiligi naturan gason kiel hejtaĵon en preparado de salo. Sed en la malnova Ĉinio laŭplana prospektorado kaj eksplutado neniam estis faritaj al la natura gaso de la provinco.

Post la Liberiĝo de la tuta lando en 1949 eksplutado al la natura gaso de Siĉuan akiris relative rapidan disvolviĝon. En la lastaj du jaroj oni jam boris nombron da novaj gasputoj kaj konstatis, ke Siĉuan havas vastan areon entenantan gason. Krome oni plene utiligis la ekzistantajn gaskampojn kaj gasputojn. Oni trovis novan gastavolon sub la tero. La eksplutita kvanto de gaso de 1972 estas trioblo de tiu de 1965 kaj la nove trovita kvanto de natura gaso estas pli ol unuoblo de la antaŭe trovita.




# Amikeca kunligilo

## EKFUNKCIIS LA AERA SERVO INTER PARIZO KAJ PEKINO

"Pli mallonga fariĝis nun la distanco inter Parizo kaj Pekino!" La vortojn ŝatis diri multaj francaj amikoj, kiam ili venis al la flughaveno por bonvenigi la Ĉinan Amikan Vizitan Delegacion.

Parizo situas en okcidento de Eŭropo, dum Pekino en oriento de Azio, kaj la distanco inter ili estas preskaŭ dekmil kilometroj. Sed kial oni diris, ke ili fariĝis nun pli proksimaj? Ĉar la francaj amikoj aludis per tiuj vortoj la lastatempan malfermiĝon de la aerlinio inter Parizo kaj Pekino. Ili diris, ke la aerlinio rekte kunligas la ĉefurbojn de ambaŭ landoj kaj kreis favoran kondiĉon por pli vasta amika kontaktado inter la du popoloj. Iuj el ili eĉ nomis ĝin "amikeca aera koridoro".

Laŭ la interkonsento de la ĉina kaj franca registaroj, tiu ĉi aerlinio oficiale ekfunkciis en la oka de septembro, 1973. La Civila Aviado de Ĉinio havas fakajn rilatojn kun multaj aviadaj kompanioj de la mondo, unu el kiuj estas la Franca Aeroservo. Frue en la jaro 1966, t.e. du jarojn post la starigo de la diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Francio, la aerlinio inter Parizo kaj Ŝanhajo jam oficiale ekfunkciis. La linio faris kontribuon por disvolvi la amikan kunlaboron inter ambaŭ landoj. Nun dufoje en semajno la aviadiloj flugas inter Parizo kaj Pekino. Tio montris novan disvolviĝon de la amikeco inter Ĉinio kaj Francio kaj iliaj popoloj.

Por celebri la oficialan ekfunkcion de la aerlinio, la Ĉina Amika Vizita Delegacio estrata de Jan Ĝihiang, vicestro de la Ĝenerala Administrejo de la Civila Aviado de Ĉinio, forlasis Pekinon je la 17-a de novembro al Parizo per franca aviadilo por fari vizitadon laŭ la invito de la Franca Aeroservo. Sur la vojo, stevardinoj faris varman servadon al la ĉinaj amikoj kaj intime interparolis kun ili en la ĉina lingvo. En tiu atmosfero la delegacio atingis Parizon je la 3-a horo de la 18-a laŭ la pekina tempo post 17-hora flugado. Ja vere proksimaj fariĝis Parizo kaj Pekino.

Dum sia restado en Parizo, la delegacio ĉie ricevis bonvenigon kaj varman akcepton de francaj diversrondaj personoj.

En la akcepta kunveno okazigita de la ĉina ambasadoro Zeng Taŭ por la delegacio, la ekfunkcio de la aerlinio inter Parizo kaj Pekino fariĝis unu el la ĉefaj temoj interparolataj de la ĉinaj kaj francaj amikoj. Iu instruistino, kiu antaŭ nelonge vizitis Ĉinion, renkontis konaton en la delegacio kaj eklarmis pro ĝojo. Ŝi diris, ke post reveno al sia lando ŝi jam faris pli ol dek raportojn pri Ĉinio. "Nun aeroservo funkcias inter ambaŭ ĉefurboj, tio pliproksimigis la francajn kaj ĉinajn popolanojn!" diris ŝi kun profunda amikeco.

## KUNVENO DE KALIGRAFAJ MAJSTROJ

En la 17-a de novembro, 1973, en la Orkideejo de la ĉarma Ĝongŝan-parko de Pekino, ĉinaj kaligrafoj kaj amikoj de la Delegacio de Japanaj Kaligrafoj ĝoje intervidiĝis kaj improvizis skribadon.

Ĝaŭ Puĉu kaj fama japana sigelgravuristo Kagava Houn faris paroladojn sinsekve en la kunveno.


Ĝaŭ Puĉu improvize legis jenan versaĵon:

*Kaligrafio havas fonton de la antikveco,*
*Dum pli intima nun fariĝis nia amikeco.*
*Ĝong Jaŭ kaj Ĝang Ĝi* restis ĉiam same famaj plej,*

*Ni faru l' Orientan Maron la peniklavej',*
*Kaj sub penikoj niaj floras amikecaj floroj,*
*Kiuj printempas en la ambaŭ landoj kun fervoro.*

Post la legado li skribis ĝin sur blanka delikata paperpeco kaj tio rikoltis varman manklakadon de la ĉeestantoj. Kaj Kagava Houn ekprenis penikon kaj skribis vortojn "Montotranslokigo fare de Malsaĝa Avo" kun fortikaj strekoj. Poste, la japanaj kaligrafoj sinsekve improvizis skribadon. Baj Jo Teki skribis per *liŝu*-stilo "Giganta, senŝanceliĝa kaj fortika unuiĝo kiel urbomuro" kun pompeco. Murakami Miŝima skribis unu verson de Prezidanto Maŭ "Senlimaj beloj sorĉas sur montoj de danĝero" en *caŭŝu*-stilo. Murakami Hokkaj

*Kangava Houn, vicestro de la Delegacio de Japanaj Kaligrafoj skribas ĉinajn ideografiaĵojn signifantajn "Montotranlokigo fare de Malsaĝa Avo".*



*Ĝaŭ Puĉu skribas poemon.*



glate kaj senĝene skribis "Poluri per alies ŝtono mian jadon". La kaligrafiaĵoj de la japanaj amikoj ricevis aplaŭdon de la ĉinaj kolegoj.

La skribaĵoj de la japanaj kaligrafoj montris ke la kaligrafiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio fontis de antikve kaj fluas senfine. En la 1-a jarcento, Japanio jam komencis uzi han-ajn ideografiaĵojn. En la 8-a jarcento, japanoj kreis Rondan Kanaon (unu el la du japanaj alfabetoj), kaj oni ĝin uzis mikse kun la han-aj ideografiaĵoj. La japanaj kaligrafoj diris, ke kaligrafio estas arto furoranta nuntempe en Japanio kaj tre ŝatata de la popolanoj, iuj eĉ lertas en tio kun alta instruiteco. Tiu ĉi delegacio estas unu el la ses delegacioj de japanaj kaligrafoj, kiuj vizitis Ĉinion post la jaro 1958. Multaj amikoj de la delegacio jam plurfoje vizitis Ĉinion kaj havis profundan amikecon kun la ĉinaj kolegoj. Kaj hodiaŭ, la dulandaj kaligrafoj kune improvizis skribadon en la sama ĉambro, tio montris eksterordinaran intimecon.

Niaj kaligrafoj de la maljuna generacio ĉeestis la kunvenon kaj improvizis sian arton. La kunvenon ĉeestis ankaŭ niaj junaj kaligrafiaj amatoroj. La 15-jara Tang Moĵu, lernanto de la 15-a Mezlernejo de Pekino, skribis "Iri dekmil liojn da vojo" en *hiaŭĝuan*-stilo, laboristo-amatoro Vang Ĉenghi skribis "Prosperas bela juneco" en *liŝu*-stilo kaj juna kaligrafo Liu Binŝeng skribis "Vera scio devenas de la praktiko". Ĉio ĉi tio gajnis laŭdon de la japanoj.

Niaj pentristoj Guan Ŝanjue kaj Ŝaŭ Ju faris pentradon en la kunveno. Kun lerta strekado, Guan Ŝanjue pentris per pala inko verdan pinon titolitan *Senlimaj beloj sorĉas sur montoj de danĝero.*



*Pentristo Guan Ŝanjue surskribas pentraĵon pri pinarbo per ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj "Senlimaj beloj sorĉas sur montoj de danĝero".*

Kiam Ĝaŭ Puĉu kaj Kagava Houn reciproke donacis kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn de la ĉinaj kaj japanaj kolegoj, tondris manklakado kaj sonis ridado en la Orkideejo plena de intimeco kaj amikeco inter la ĉinaj kaj japanaj kaligrafoj.

## EN LA ĈINA EKSPOZICIA HALO

En septembra Teherano, ĉarmis aŭtuno. En bela loko sude de la monto Demavend en la norda antaŭurbo okazis la Unua Teherana Internacia Komerca Foiro partoprenata de 22 landoj. Ankaŭ Ĉinio invitite patroprenis en ĝi, tio estas la unua fojo post multaj jaroj, ke Ĉinio prezentis siajn produktadon, konstruadon, ekonomion kaj komercon al la irana popolo.

La foiro daŭris de la 11-a ĝis la 24-a de septembro, 1973. En tiu periodo la nombro de vizitantojal la ĉina halo atingis pli ol 350,000 personfojojn. Iuj ĝin eĉ rigardis plurfoje. Iu 77-jara maljunulo, kiu venis de fore je 300 km. subtenate de sia filino por speciale ĝin viziti, atenteme rigardis la fotojn de amika kontaktado inter Ĉinio kaj Irano en la lastaj jaroj. Montrante la skizon de la silka vojo sur la muro, li diris al sia filino: "Niaj praavoj kontaktiĝis ĝuste per tiu ĉi vojo, kaj hodiaŭ mi vidis tie ĉi la silkan landon — Ĉinion." Vidinte la fotojn de brodaĵoj de la antikva Persio trovitaj en Ĉinio, iu irana ĵurnalisto diris kun profunda kortuŝiteco: "Kiom multe da similaĵoj ja troviĝas en Ĉinio kaj Irano! En la elterigitaĵoj de Ĉinio troviĝas niaj antikvaj brodaĵoj, kaj en nia ekspoziciejo de antikvaĵoj estas multaj porcelanaĵoj de la antikva Ĉinio, tio estas atesto de la tradicia amikeco inter ambaŭ landoj." Iu instruisto kun grupo da knaboj de iom pli ol dek jaroj petis fotojn de pekina pejzaĝo. Li diris: "Mi volas eduki la knabojn koni Ĉinion kaj daŭrigi la tradician amikecon inter la irana kaj ĉina popoloj." Iuj rigardantoj petis la membrojn de la ĉina ekspozicia grupo fari subskribon. La ĉinaj grupanoj skribis en la ĉina lingvo: "Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Irano!" Kaj ankaŭ la iranaj amikoj skribis tuj sube en la persa lingvo: "Vivu la amikeco inter Irano kaj Ĉinio!"

Princo Mahamoud Reza Pahlavi, plijuna frato de la irana reĝo, vizitis la ĉinan halon. La princo atente pririgardis la ekspozaĵojn kaj transdonis la zorgon de la reĝa moŝto al la ĉina halo. Ĝin vizitis ankaŭ S-ino Farideh Diba, patrino de la irana reĝino. Ŝi diris al la respondeculo de la ĉina grupo, ke post rigardo ŝi tuj rememoris kiel varme regalis ŝin la ĉinaj amikoj kiam ŝi akompanis la reĝinon en vizitado al Ĉinio.

Multaj iranaj amikoj donis grandan atenton al la disvolvo de komerco inter Irano kaj Ĉinio. Ekde la jaro 1971, en kiu stariĝis la diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Irano, rapide disvolviĝis la komerco inter ambaŭ landoj. Multaj iranaj komercaj amikoj diris post la vizito de la ĉina halo, ke la ĉina halo ne nur helpis la iranan popolon pli bone koni Ĉinion, sed ankaŭ akcelis la pluapaŝan disvolviĝon de komerco inter ambaŭ landoj.

---

* Ĝong Jaŭ (151-230) kaj Ĝang Ĝi (?—ĉ.192) estis famaj antikvaj kaligrafoj de Ĉinio.

# Ekspozicioj de fremdaj landoj en Pekino


VINTRE de 1973, en ekspozaj haloj de Pekino okazis la Ekspozicio de Pentraĵoj pri la Nacia Liberiga Milito de Jugoslavio, la Ekspozicio de Rumanaj Modernaj Pentraĵoj kaj la Ekspozicio de Industria Tekniko de Nederlando.

La ekspozataj jugoslavaj petraĵoj inkluzivas olepentraĵojn, lignogravuraĵojn, akvafortojn, ŝtongravuraĵojn k.c. Tiuj ekspozaĵoj spegulis en diversaj flankoj la batalan vivon de la jugoslava popolo dum la nacia liberiga milito kaj malkaŝis masakran krimon de la faŝistaj agresantoj. La olepentraĵo "Ofensivo en Frua Mateno" prezentis sangan batalon de bravaj jugoslavaj gerilanoj kontraŭ malamikoj. La olepentraĵo "Liberigo de Novi-Sad" prezentis ĝojon de la jugoslavaj armeo kaj popolo post akiro de la venko de la nacia liberiga milito. Tiuj verkoj ebligis al ĉinaj pentristoj kaj spektatoroj plie koni la batalan vivon de la jugoslava popolo kaj atingojn de ĝiaj pentristoj en arta verkado.

La ekspozicio de Rumanio spegulis la revolucian batalon kaj atingojn de la rumana popolo en socialisma konstruado. La ekspozataj olepentraĵoj, kartonaj olepentraĵoj kaj rezinaj pentraĵoj estas lastjare verkitaj de rumanaj pentristoj. La olepentraĵo "Membroj de la Komunisma Junulara Ligo" prezentis rumanajn junulojn brave antaŭenmarŝantajn sur la vojo de socialisma konstruado. "Konstruejo" kaj "La konstruejo Tice Iron", la verkoj de la prezidanto de la Rumana Belartista Asocio Covaliu Bra'dup, figure montris prosperan disvolviĝon de la rumana konstruado. La olepentraĵo "Okupata Plugado en Printempo" prezentis al la rigardantoj viglecplenan laboran scenon de rumanaj agrikulturaj kooperativanoj por akiri riĉan rikolton. La kreaj atingoj de rumanaj pentristoj ricevis varman aplaŭdon de la ĉinaj rigardantoj.

La ekspozicio de Nederlando ekspozis elektronajn kaj medicinajn instrumentojn, produktaĵojn de kemia, maŝinfabrika kaj manĝaĵ-paka industrioj de Nederlando k.a. La plejparta areo de Nederlando apartenas al malalta ebenejo, 24% de ĝia totala areo estas pli malalta ol la mara nivelo. La ekspozataj modeloj kaj fotoj pri akvoutiligaj konstruaĵoj, havena konstruado kaj ŝipkonstrua industrio prezentis sukcesojn de la nederlanda popolo akiritajn en senĉesa polderiga batalado kontraŭ la maro. Tiun ekspozicion rigardis multaj ĉinaj spektatoroj.

*Memore al Batalantoj de Sutjeste* *de Mujezinnoviĉ Ismet*



# La tuj falonta naciperfida kliko de Lon Nol

LA reĝimo de la naciperfida kliko de Lon Nol en Kamboĝo estas starigita per puĉo subtenata de Usono kaj aliaj fremdaj fortoj. Tuj post kiam ĝi kaptis la potencon en marto de 1970, ĝi renkontis fortegan opozicion de la kamboĝa popolo. La popolo tuj leviĝis kaj la incendio de la armita kontraŭstaro flamiĝis tra la tuta lando en nur kelkaj monatoj. Unuigante la popolanojn de diversaj socitavoloj de la tuta lando, la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo kaj la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo kun Samdek Norodom Sihanuk kiel la ĉefo venke liberigis pli ol 90% de la teritorio kaj pli ol kvin milionojn da loĝantoj en 3 jaroj kaj pluraj monatoj.

Nun la naciperfida kliko de Lon Nol alfrontas fatalon de plena pereo en la vasta maro de la popola milito de Kamboĝo. Ĝi estas en kompleta izoliteco eĉ en iuj urboj provizore regataj de ĝi mem. La popolanoj faras diversformajn batalojn kontraŭ la kliko de Lon Nol. Strikoj kaj manifestacioj okazis unu post alia kun ĉiam pligrandiĝanta skalo kaj kun partopreno de ĉiam multiĝantaj socitavoloj. Multaj loĝantoj iris al la liberigitaj regionoj, kio montris la korinklinon de la popolo. En septembro de la pasinta jaro pli ol 30,000 loĝantoj de Kompong Cham iris al la liberigitaj regionoj. Sin sekvis leviĝoj kaj dizertoj de la pupaj trupanoj. Eĉ okazis bombadoj al la Prezidanta Palaco fare de oficiroj de la aera armeo. Ĉio ĉi tio formis grandan fluon de batalo kontraŭ la naciperfida kliko de Lon Nol, kio forte batis la ŝanceliĝantan reĝimon de Lon Nol, kunagante kun la Naciliberigaj Popolaj Armitaj Fortoj.

Perdinte subtenon de la popolo la naciperfida kliko de Lon Nol devas dependi de la armeo nutrata de Usono por teni sian lastan vivon. Tamen tiu ĉi armeo estas monde famkonata pro sia putriĝo kaj senkapableco. Estas ĉirkaŭ 200,000 soldatoj en la salajra nomlisto de la plej alta komandejo de Pnompeno, sed triono de tiuj efektive estas neekzistantaj "fantomaj trupanoj", kiujn la oficiroj listigis por akiri la pagojn. Alia grupo da soldatoj estas "salajrnomlistaj trupanoj", ĉar ili aperas ĉiun monaton nur en la tempo por ricevi la salajron, kies parton ili tributis al sia "supera oficiro" kaj revenis hejmen. La salajro por ĉiu soldato vere servanta en la pupa armeo estas nur 4,000 *riel* (kamboĝa monunuo), per kiuj oni povas aĉeti nur 6.5 kilogramojn da rizo laŭ la prezo de nigra merkato de la pasinta oktobro. Eĉ tiu malgranda sumo es-



*Popolanoj de diversaj socitavoloj de kamboĝa liberigita regiono bonvenigas siajn armeanojn.*

tas ofte detenita kaj iam la soldatoj ricevis eĉ neniun pagon dum pluraj monatoj. En kontrasto, la altrangaj oficiroj vivas diboĉe kaj lukse en Pnompeno kaj sendis siajn familianojn kaj prirabitajn riĉaĵojn al fremdaj landoj.

La soldatoj en malsateco, kiuj ne povas vivteni siajn familianojn, ne volas oferi sian vivon por la manpleno da naciperfiduloj, iris al la liberigitaj regionoj aŭ dizertis en grupoj. Sur la militejo iuj soldatoj diskuris je aŭdo de pafo, aliaj rifuzis obei komandajn ordonojn kaj triaj, kunportante usonajn armilojn, estis kaptitaj de la Popolaj Armitaj Fortoj. Tiamaniere la kliko de Lon Nol ĉiujare perdis pli ol 100,000 soldatojn, inkluzive mortigitajn kaj vunditajn.

La reĝimo de Lon Nol almozpetis ĉiujare de Usono militan helpon de pli ol cent milionoj da dolaroj, tamen la usonaj dolaroj ne povas kovri ĝian senĉese pliiĝantan financan deficiton, kiu atingis 1,000 milionojn da *riel* en 1971, 1,500 milionojn en 1972 kaj pli ol 3,000 milionojn en 1973. Vizaĝe al tiu oble pliiĝinta financa deficito la naciperfida kliko de Lon Nol senbride emisiis paperan monon, kio foje-refoje devalutis *riel* kaj kaŭzis seriozan inflacion. Laŭ statistiko de spertuloj, la inflacio multe superis 100%.

Rezulte de la rapida reduktiĝo de la regiono regata de la kliko de Lon Nol kaj ĝia fiago, la rizkultura areo de 1972-1973 estis nur triono de tiu de 1968-1969. Tradicie riz-eksportanta Kamboĝo fariĝis riz-importanta lando. En 1969 ĝi eksportis 88,000 tunojn da rizo, tamen ĝi importis 75,000 tunojn da rizo en 1972. Krom rizo, ĉiuj aliaj vivbezonaĵoj en la regiono regata de la naciperfida kliko de Lon Nol estas transportitaj de Usono kaj ĝiaj satelitoj al ĝi per aviadiloj kaj ŝipoj. La malfavora saldo de eksterlanda komerco en 1973 atingis 123 milionojn da usonaj dolaroj.

Nun en la "Khmera Respubliko" de la naciperfida kliko de Lon Nol estas nek demokratio nek libereco, sed nur faŝista diktaturo. La kliko de Lon Nol publikigis amason da faŝistaj leĝoj kiaj "urĝa leĝo", "milita leĝo" kaj "leĝo pri ĝenerala mobilizado" kaj ofte deklaris la "urĝan staton tra la tuta lando" por senigi la popolanojn je demokratiaj rajtoj kaj ilin subpremi kruele. Krome ĝi laŭplaĉe faris traserĉadon kaj amasan areston, sigelis lernejojn kaj malpermesis eldonon de ĵurnaloj kaj gazetoj.

La naciperfiduloj Lon Nol, Sirik Matak, In Tam kaj Cheng Heng ofte interluktis pro povo



*Policano de la Naciliberigaj Popolaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo gardostaras ĉe la enirejo de Kratie.*

aŭ profito. Kiam ili efektivigis certan provizoran kompromison sub usona premo, oni ekmemoris la ridindan "respublikon". Kaj tiam ĉe la pordo de la pupa registaro aperis elpendaĵo de "plej alta politika konsilantaro" aŭ "kabineto".

La kliko de Lon Nol estas ne nur enlande forĵetita de la popolo, sed ankaŭ internacie famaĉa kaj izolata. Ĉiuj justosubtenantaj landoj kaj popoloj konsideras, ke la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo kun Samdek Norodom Sihanuk kiel la ĉefo estas la unika laŭleĝa registaro en Kamboĝo. Tion pruvis la fakto, ke la Konferenco de Ŝtataj kaj Registaraj Ĉefoj de Nealiancitaj Landoj okazigita en la pasinta jaro kun partopreno de pli ol 70 landoj postulis tuj rekoni la Reĝlandan Registaron de Nacia Unuiĝo kiel la solan laŭleĝan registaron de Kamboĝo.

La naciperfida kliko de Lon Nol estas nur politika kadavro. Se ne estus subteno de Usono, ĝi jam falus antaŭ longe. Tamen la subteno de Usono ne povas savi ĝin el la plena pereo.




# LI-NACIECO

SUR Hajnan-insulo en la suda parto de Guangdong-provinco de nia lando loĝas pli ol 500,000 lioj, inter kiuj pli ol 400,000 koncentriĝas en Tongŝi, la ĉefurbo de la Li- kaj Mjaŭ-a Aŭtonoma Subprovinco de Hajnan-insulo, kaj ĝiaj proksimaj gubernioj.

Frue antaŭ Kin- kaj Han-dinastioj lioj translogiĝis de Guangdong- kaj Guanghi-provincoj sur la kontinento al Hajnan-insulo. Post Tang- kaj Song-dinastioj, ili fikse loĝiĝis tie kaj sin nomis *ha*, *gej*, *mojfaŭ* kaj *ŝaj* laŭ malsamaj dialektoj de diversaj lokoj. Post la Liberiĝo ili prenis al si komunan nomon "li-nacieco" laŭ la volo de la vastaj amasoj de lioj.

Pro la supre dirita kaŭzo la regiono loĝata de li-oj konservas striktajn rilatojn kun Guangdong kaj Guanghi de la kontinento en politiko, ekonomio, kulturo kaj aliaj flankoj. La restaĵoj de neolito elfositaj en la du lokoj, kiaj ilaro el ŝtono kaj fajencaĵoj, apartenas al la sama speco de kulturo. En la jaro 112 a.K., Han-dinastio establis 9 prefektujojn en la suda parto de Guangdong, inter kiuj du sin trovis en Hajnan-insulo. Post Tang- kaj Song-dinastioj granda nombro da hanoj venis al Hajnan-insulo. Ili vivis kaj terkulturis kune kun lioj kaj starigis profundan amikecon.

Sub la malluma regado de la kuomintangaj reakciuloj kaj nacia diskriminacio kaj klasa subpremado de la feŭdaj dinastioj en la longaj malfacilaj jaroj antaŭ la Liberiĝo, malrapide disvolviĝis la ekonomio en li-regiono. Antaŭvespere de la Liberiĝo kvankam ĝi jam envenis en la feŭdan socion, tamen ĝia evoluo estis malekvilibra.

En la ordinaraj regionoj, kiuj okupas 90% de la totala areo kaj en kiuj loĝas 90% de lioj, la ekonomia karaktero fundamente egalis al tiu de hanoj, tamen al nivelo de agrikulturo kaj metio estis iom malpli alta ol tiu en han-regiono. Feraj agrikulturiloj estis uzataj jam delonge, tamen neĝenerale. Oni terkulturis ordinare per lignaj erpiloj. Malbona estis agrikultura administrado kaj granda estis diferenco de terposedo. Bienuloj kruele ekspluatis liojn per terrento, uzuro, dungado kaj senpaga servado, kaj la kuomintangaj reakciuloj ilin perforte superimpostis, kio kaŭzis malprosperon de ekonomio en li-regiono kaj ekstreman mizerecon de la popola vivo.

En la interna regiono de Vuĝi-montaro lioj konservis terkulturan sistemon kun primitiva naturo.

*Piproj maturiĝis.*



Laŭ tiu sistemo kelkaj samsangaj familioj de 2-3 generacioj sin organizis en komunumon, en kiu ili kune laboris kaj distribuis egalmezure produktaĵojn al ĉiu loĝanto.

La lioj plejparte loĝas koncentre laŭ la familia nomo. Ili lertas en dancado kaj kantado kaj havas revolucian tradicion de batalo. Frue en la jaro 87 a.K. por kontraŭstari barbaran superimpostadon fare de la lokaj oficistoj, lioj, hanoj kaj alinaciecaj membroj mortigis oficistojn, kaj per tio ekludis la uverturon de batalo. De tiam, ĉiam brulis la indigna flamo de batalo kontraŭ la nacieca kaj klasa subpremado. Post la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, la batalo de lioj eniris en novan etapon. Somere kaj aŭtune de 1931 en multaj montvilaĝoj de lioj kaj hanoj en Lingŝuj kaj Jahian leviĝis tajdo de la agrara revolucio kaj post tio stariĝis revolucia bazloko. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiam la kuomintanga armeo malvenke retiriĝis paŝon post paŝo, li-popolanoj sin organizis en gerilajn taĉmentojn sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj persiste batalis kontraŭ la japanaj agresantoj. En la Liberiga Milito liaj kaj hanaj popolanoj starigis Kjong-ja-brigadon de ĈPLA kaj senĉese donis fortan baton al la kuomintangaj reakciuloj. Ĝis septembro de 1949 ĝi liberigis pli ol 70 urbojn kaj urbetojn sur Hajnan-insulo.

Post la Liberiĝo, por plene forigi malriĉecon kaj postiĝintecon li-popolanoj sukcese faris agraran reformon kaj plenenergie disvolvis agrikulturon, industrion, kulturon kaj edukon. Li-regiono, kiu sin trovas en tropiko kaj subtropiko, havas bonegajn naturajn kondiĉojn. Ĝi ĉiujare povas doni tri rikoltojn de rizo kaj abundas je gumarboj, kokosarboj kaj aliaj tropikaj arboj kaj maraj produktaĵoj kaj ankaŭ havas riĉajn minaĵojn de kupro fero, mangano, volframo k.a. Ĉio ĉi tio donis favorajn kondiĉojn al li-popolanoj por konstruado de ilia hejmloko kaj la granda patrolando.

Post la Liberiĝo rapide disvolviĝis la agrikulturo de li-regiono kaj senĉese altiĝis ĝia produktokvanto. Grandskale leviĝis ankaŭ la totala produktokvanto de industrio, kaj Tongŝi estas miniaturo de industria disvolviĝo de tiu regiono. Antaŭ la Liberiĝo tie estis montoj frekventataj de aproj, vipuroj, tigroj kaj leopardoj, tamen nun ĝi jam fariĝis mezgranda urbo kun fabrikoj de maŝinfarado, elektro, elektronaj ekipaĵoj, kemisterko, cemento kaj medikamentoj. Multaj lioj fariĝis gloraj komunistoj kaj elstaraj laboristoj. Jam formiĝis reto de ŝoseoj en la tuta insulo kaj ĉirkaŭa fervojo sur la insulo estas en konstruado.

Rapide disvolviĝis ankaŭ la kultura kaj eduka aferoj de li-nacianoj. Ne nur multiĝis elementaj kaj mezaj lernejoj en la aŭtonoma subprovinco, sed ankaŭ ĝenerale fondiĝis grupoj de ĵurnallegado kaj klerigo. Ĉiu gubernio havas sian hospitalon, ĉiu komunumo kaj brigado sanitarejon, kaj ĝenerale efektiviĝis sistemo de koopera kuracado. Variolo, ĥolero, morbilo, malario kaj aliaj epidemioj furiozintaj en li-regiono antaŭ la Liberiĝo nun estas jam eliminitaj kaj la higiena fizionomio de tiu regiono radikale ŝanĝiĝis.

La li-popolanoj venke marŝas sur la granda vojo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

*Komunumanoj de Li-nacieco aĉetas bezonaĵojn ĉe komerca stacio.*





Ĉina Geografio

# La ĉinaj montaroj

EN Ĉinio la montaroj kruciĝas en kompleksa desegno. Laŭ la direkto, en kiu ili iras, ili povas esti dividitaj en la sekvantajn tri grupojn.

## ORIENTEN-IRAJ MONTAROJ

La ĉinaj plej gravaj montaroj ĉiuj apartenas al tiu ĉi grupo, kiu inkluzivas preskaŭ ĉiujn gigantajn montojn de okcidenta Ĉinio — Altaj-, Tianŝan-, Kunlun-, Karakoram-, Ganggardesi-, Himalaja-, Kinling- kaj Nanling-montarojn.

**Altaj-montaro:** Situanta en la norda parto de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, ĝi estas ĝenerale pli ol 3,000 metrojn alta super la marnivelo. Kun iom post iom malpliiĝanta alteco, ĝi etendiĝas sudorienten al la Mongola Popola Respubliko.

**Tianŝan-montaro** iras tra la mezo de Hingiang kaj dividas ĝin en Ĝungar- kaj Tarim-basenojn. Ĝi estas 250-300 kilometrojn larĝaj de la nordo al la sudo kaj 3,000-5,000 metrojn alta super la marnivelo. Ĝi konsistas el kelkaj paralelaj montĉenoj kun ĉielskrapaj pintoj, inter kiuj estas kelkaj kavaj basenoj kiel la fame konata Ili-valo en la okcidento kaj la fama Turfan-baseno en la oriento, 154 metrojn sub la marnivelo. La gigantaj pintoj de Tianŝan-montaro en la okcidento altas ĉirkaŭ 7,000 metrojn kaj iom post iom reduktiĝas la alteco de la montaro dum ĝi iras orienten. Daŭre irante orienten preter Urumĉi, ĝi iom post iom malaperas en la dezerto. Pro la influo de aera fluo de la Arkta Oceano, la norda deklivo de Tianŝan-montaro estas pli humida ol la suda. Tianŝan-montaro estas la ĉefa paŝtejo en Hingiang.

**Kunlun-montaro:** Komence de Pamiro en la okcidento, ĝi etendiĝas orienten ĝis la okcidenta rando de Siĉuan-baseno. Ĝiaj relative ebenaj suproj estas ĝenerale pli ol 5,000 metrojn altaj super la marnivelo, kaj estas ne malmultaj pintoj 7,000 metrojn altaj. En la okcidenta parto estas multaj glaci-riveroj. La orienta parto en profunda interna lando havas ekstreme sekan klimaton.

Kiam Kunlun-montaro etendiĝas orienten, ĝi dividiĝas en tri branĉojn. La norda branĉo estas Altin-montaro, kiun, irante pli orienten, fariĝas Kilian-montaro; tiuj du formas la nordan randon de la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo. Kilian-montaro, situanta sude de la Riverokcidenta Koridoro de Gansu-provinco, ĝenerale altas pli ol 4,000 metrojn super la marnivelo. La centra branĉo de Kunlun-montaro estas Ĉimetag-montaro. Ĝi kune kun Altin-montaro ĉirkaŭas Cajdam-basenon, kiu estas baseno en la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo. La suda branĉo estas Kokohili-montaro, kiu, irante pli orienten, fariĝas Bajankara-montaro, la valdivido inter Jangzi-rivero kaj la Flava Rivero.

**Karakoram-montaro:** Komence de sudokcidenta Hingiang, ĝi etendiĝas orienten en la norda parto de Tibeto, de kie ĝi iras sudorienten. Ĝi havas multajn neĝajn pintojn altajn meznombre je pli ol 6,000 metroj super la marnivelo, kaj masivajn glaci-riverojn.

**Ganggardesi-montaro:** Situanta norde de Jalucangpo-rivero, ĝi estas la valdivido inter la akvosistemo de la internlanda altebenaĵo kaj tiu de la Hinda Oceano. La pintoj altas ĉirkaŭ 7,000 metrojn super la marnivelo.

**Himalaja-montaro:** Starante impone laŭlonge de la suda rando de la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo, ĝi formas arkon elstarantan suden. La ĉefa parto de la montaro kuŝas en Ĉinio. "Himalaja" sig-

1 *Himalajo*

2 *Tianŝan M.*

3 *Altajo*

4 *Kunlun M.*

5 *Kilian M.*


6 *Kinling M.*

7 *Nanling M.*

8 *Granda Hing-an M.*

9 *Tajvan M.*

10 *Hengduan M.*





nifas "Lokon de Neĝo" en la tibeta lingvo. La meznombra alteco de tiuj montoj estas pli ol 6,000 metroj super la marnivelo. Okcidente de la urbo Jadong estas serio da montpintoj pli ol 8,000 metrojn altaj, inter kiuj la montpinto Ĝolmolungma, situanta ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Nepalo, kiu havas altecon de 8,882 metroj super la marnivelo, estas la plej alta montpinto en la mondo. En 1960, ĉina montgrimpista grupo starigis la rekordon de la unuafoja surgrimpo de la norda deklivo de Ĝolmolungma. En 1966 kaj 1967, Ĉinio denove faris ampleksan sintezan esploron pri tiu montpinto kaj metis sciencan bazon por ekspluatado kaj utiligo de la naturaj riĉfontoj. Jalucangpo-rivero fluas de okcidento orienten laŭlonge de ĝiaj nordaj montpiedoj kaj ĉe 95 gradoj de orienta longitudo turniĝas suden kaj pasas tra Himalaja-montaro, kie ĝi formis grandiozan montgorĝon.

La seninterrompaj gigantaj altaj pintoj de Himalaja-montaro blokas la humidan aerfluon blovantan de la Hinda Oceano. Tial, la sudaj montdeklivoj havas abundan pluvakvon kaj estas plene kovritaj de vegetaĵoj, dum la nordaj deklivoj, en klara kontrasto, estas sekaj kun maldensaj vegetaĵoj. Kun pliiĝo de la alteco de la montaro, la natura aspekto senĉese ŝanĝiĝas, formante serion da zonoj unu sur alia. Ĉar tie la montoj abrupte altiĝas, tial la vertikala serio de naturaj zonoj estas facile rimarkeblaj. De rivera valo je 2,000 metroj super la marnivelo ĝis la montpinto alta je pli ol 8,000 metroj super la marnivelo, la natura panoramo ŝanĝiĝas rapide, kvankam la horizontala distanco estas nur kelkdek kilometroj. En la varma humida malaltejo ĉiamverdaj larĝfoliaj arboj prosperas, formante ĉiam verdan larĝfolian arbarzonon. Kun pliiĝo de alteco, la varm-amaj larĝfoliaj arboj mal-



*Ĉinaj montogrimpistoj en konkerado de la monto Ŝisah Pangma*

*Nanling-montaro*



plimultiĝas kaj malaperas, dum la frostrezistaj pinglofoliaj arboj iom post iom plimultiĝas kaj fariĝas superegaj, formante pinglofolian arbarzonon. Pli supre, ĉar ne sufiĉe altas la varmeco, la arboj estas anstataŭitaj de arbedoj kaj aperas arbedar-zono. Ankoraŭ pli alte sin trovas unue herbej-zono kaj poste likena zono. La plej alta regiono estas tiu de konstanta neĝo. La ŝanĝoj en pejzaĝo, kiujn oni vidas suprenirante la montaron, estas la samaj kiel tiuj, kiujn oni vidas dum la vojaĝo de varma suda Ĉinio al la frosta Norda Poluso.

**Kinling-montaro** etendiĝas ĉirkaŭ 1,500 kilometrojn trans centra Ĉinio de suda Gansu ĝis inter la malsupraj basenoj de Huajhe- kaj Jangzi-riveroj. Kinling-montaro estas la valdivido inter la basenoj de la Flava Rivero kaj Jangzi-rivero. Ĝia parto en Ŝenhi-provinco estas tipa, kaj ĝia meznombra alteco estas inter 2,000 kaj 3,600 metroj. La nordaj deklivoj estas krutaj kaj la sudaj malkrutaj. Kinling-montaro malhelpas la invadon de la humida oceana aerfluo profunde en la nordokcidenton kaj samtempe ĝi baras la nordan malvarman aerfluon tiel ke la lasta ne povas senbride invadi suden, kaj suda Ŝenhi kaj Siĉuan estas malofte

atakataj de furioza malvarma aerfluo. Sekve Kinling-montaro fariĝis natura dividlinio inter la subtropika kaj varma mildtemperatura zonoj de Ĉinio. La rivero sur la sudaj deklivoj estas longaj, dum tiuj sur la nordaj deklivoj plejparte estas mallongaj kaj malgrandaj.


**Nanling-montaro:** Etendiĝanta de norda Guanghi tra Hunan kaj Guangdong ĝis suda Gianghi, ĝi estas la valdivido de la akvosistemo de Jangzi-rivero kaj tiu de Perlo-rivero. Ĝi altas ĝenerale pli ol 1,000 metrojn kaj je la plej alta punkto, 2,000 metrojn super la marnivelo. Inter la granitaj montoj estas multaj pasejoj kaj basenoj, kiuj estas malaltaj kaj ebenaj. Multaj el ili fariĝis gravaj trairejoj por komunikado inter nordo kaj sudo. Hing'an-kanalo konstruita en la nordokcidenta angulo de Guanghi pli ol 2,000 jarojn antaŭe en Kin-dinastio tranĉis tiujn valojn por kunligi la akvosistemon de Jangzi-rivero kaj tiun de Perlo-rivero. Ankaŭ la nuna Hunan-Guanghi-a Fervojo sekvas tiun ĉi vojon. Kvankam ne tre alta, tamen Nanling-montaro ludas certan rolon en barado de la norda malvarma aerfluo, tiel ke sude de Nanling-montaro la klimato estas varma kaj la kampoj estas verdaj tutjare. Tie estas unu el la ĉefaj regionoj de nia lando por kreskigi tropikajn kaj subtropikajn plantaĵojn.


## SUDOKCIDENTEN-IRAJ MONTAROJ

Tiaj montaroj lokiĝas ĉefe en la orienta parto de Ĉinio. Ili povas esti dividitaj en du ĉenojn orientan kaj okcidentan. La orienta ĉeno inkluzivas Ĉangbaj-montaron en la nordoriento kaj la montarojn kiuj etendiĝas tra Liaŭdong- kaj Ŝandong-duoninsuloj ĝis Ĝegiang- kaj Fugian-provincoj. La montaro en Fugian, kiu iras paralele kun la marbordo, estas plej tipa. Kiel la plej alta montaro en la ĉeno, Ĉangbaj-montaro havas pintojn altajn pli ol 2,700 metrojn super la marnivelo, sed ĝia alteco ĝenerale estas ĉirkaŭ 1,000 metroj.

La okcidenta ĉeno etendiĝas suden de la Granda Hing'an-montaro en la nordoriento tra Tajhang-

*Prospektorado sur Kunlun-montaro*





montaro en norda Ĉinio kaj la montaro de la Tri Montgorĝoj de Jangzi-rivero ĝis Hjuefeng-montaro en Hunan. Tiu serio da montaroj formas la orientan randon de la Altebenaĵo de Interna Mongolio, la Loesa Altebenaĵo kaj la Junnan-Gujĝoŭ-a Altebenaĵo.

Tiuj nordorienten-iraj montaroj staras rekte en la vojo de la sudorienta musono, malfortigante ĝian profundan penetron al la interna parto de la lando. Tial ili, precipe la okcidenta ĉeno, estas la baza dividlinio inter la humida oriento kaj la seka okcidento. La Granda Hing-an-montaro estas la plej tipa.

**La Granda Hing'an-montaro:** Situante en la okcidenta parto de nordorienta Ĉinio kaj etendiĝante de nordoriente sudokcidenten, ĝi estas la valdivido de la Altebenaĵo de Interna Mongolio kaj la Liaŭhe-Songhuagiang-a Ebenejo. La montaro estas ĉirkaŭ 800 kilometrojn longa kaj 200-300 kilometrojn larĝa. Ĝiaj orientaj deklivoj estas krutaj dum la okcidentaj malkrutaj, kaj ĝiaj montpintoj estas plejparte rondecaj. Kvankam alta je nur pli ol mil metroj, ĝi malhelpas la enblovon de sudorienta musono en la internlandon kaj ankaŭ malfortigas la alblovon de la kontinenta frosta vento el la nordokcidento. Tial la klimato oriente de tiu montaro estas humida kaj tiu okcidente de ĝi estas seka. La Granda Hing'an-montaro estas grava forstobazo de nia lando, kie kreskas larikoj, betuloj kaj aliaj bonaj arbospecoj.

## SUDEN-IRAJ MONTAROJ

Tiuj montaroj lokiĝas ĉefe en okcidentaj Siĉuan- kaj Junnan-provincoj en la sudokcidento kaj en orienta Tajvan-provinco.

**Hengduan-montaro:** Serio da paralelaj suden-iraj montaroj etendiĝas de la suden-turniĝo de Jalucangpo-rivero ĝis okcidentaj Siĉuan kaj Junnan. Inter ili estas Dahjue-, Nuŝan- kaj Gaŭligong-montaroj. Tiuj altaj montoj kun profundaj valoj baras la trafikadon inter orienta kaj okcidenta Ĉinio, tial ili estas nomataj Hengduan-montaro (t.e. montaro transverse baranta). La norda parto de ili ĝenerale altas je 4,500 ĝis 5,000 metroj dum la



*Tianŝan-montaro*



*Aerplanoj protektas arbarojn de la Granda Hing-an-montaro.*

ceteraj estas des malpli altaj, ju pli sudaj ili estas, kaj tiuj en Junnan altas eĉ malpli ol 3,000 metrojn.

Kvankam Hengduan-montaro estas ne malproksima de la maro, tamen estas multaj altaj montoj ambaŭflanke de ĝi, tial la sudorienta musono el la Pacifiko kaj la sudokcidenta musono el la Hinda Oceano ambaŭ estas baritaj kaj la pluvokvanto en la montregiono estas malpliigita.

Ankaŭ la montaro en orienta Tajvan-provinco iras proksimume de nordo al sudo. Ĝia 3,950-metra Juŝan-monto estas la plej alta montpinto en sudorienta Ĉinio.



## RIĈA RIKOLTO DE KOTONO

En 1973 riĉan rikolton de kotono akiris ĝenerale la ĉefaj kotonkultivejoj Henan, Hebej, Ŝandong, Giangsu, Anhuj, Ŝenhi, Hingiang, Siĉuan kaj Hubej. Kvankam en tiu jaro ne malmultaj lokoj trafis naturajn katastrofojn de malalta temperaturo, inundo pro stagno de pluvakvo, sekegeco, ventego, hajlo, malsanoj kaj fiinsektoj, tamen la klopodado de kamparanoj de la lokoj venkis la katastrofojn, dank' al kio la totala kaj po-hektara produktokvanto de kotono superis tiun de 1972. Ekzemple, la produktokvanto de Siĉuan, Hingiang kaj Giangsu pliiĝis je 10% kompare kun tiu de 1972; tiu de Henan kaj Hebej — 20%; kaj tiu de Ŝenhi superis 40%. Iuj lokoj kultivantaj kaj kotonon kaj grenon akiris riĉajn rikoltojn de ambaŭ plantaĵoj.

## GRAVAJ MINAĴOJ NOVE TROVITAJ EN TIBETO

En la lastaj du jaroj ĉinaj prospektoroj trovis en Tibeto dekojn da gravaj koloraj, nigraj, raraj kaj nemetalaj minaĵoj, kiel ekzemple, fero, karbo, kupro, plumbo, zinko, glimo, salo, arseno kaj agato. Parto de la konservokvanto de multaj minaĵoj jam estas determinita.

Popolamasoj multe helpis en la prospektorado de minaĵoj de Tibeto. Nekompleta statistiko montris, ke en la jaro 1972 raportado de pli ol 1,800 hom-fojoj estis farita al prospektoroj pri ercoj trovitaj en pli ol 400 lokoj. Iu tibeta avino raportis al prospektora grupo pri pluraj minlokoj kaj sciigis la lokon de animalaj fosilioj, kio liveris al prospektorado valorajn materialojn.

# Eldona novaĵo el VDR

DE 1959 ĝis 1973, niaj vjetnamaj amikoj jam sukcesis aperigi pli ol 60 esperantajn librojn kun tre varia kaj serioza enhavo. Tiuj libroj ampleksas proksimume 9,000 pĝ. kaj grave riĉigis la esperantan legmaterialon.

Per tio ili brile montris, kiel oni povas inde uzi nian lingvon kaj havigi al ĝi influon inter la neesperantista publiko. Ilia konkreta laboro konvinke atestas, ke Esperanto tute ne estas ia utopiaĵo de revemuloj. Ĉiuj esperantistoj povas nur alte aprezi ilian valoran kontribuon tiel al la esperanta movado kiel al kontraŭimperiisma batalo.

Ni devas memori plie, ke ĉion faritan niaj vjetnamaj amikoj plenumis sub la kondiĉoj de krima milito, kiun la usona imperiismo trudis al la vjetnama popolo, kaj en kiuj ĝi ŝparis neniun plej malhumanan kaj kruelan rimedon, escepte de atomaj armiloj, por subigi la heroan popolon. Sed la liberama popolo multe suferinta de fremdaj invadoj sciis kiel defendi sian sendependecon kaj venki ĉiujn neimageble grandajn malfacilojn, kaj fine gajnis la militon, tiel ke la invadintoj devis konsenti retiri siajn militfortojn el la lando. Al tiu batalo niaj vjetnamaj amikoj bone kontribuis kiel indaj gefiloj de la heroa popolo.

Lastatempe venis nova informo, ke la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, komencis novan signifoplenan laboron, nome eldonon de *Antologio de la Vjetnama Literaturo*, kiu konsistos el pluraj volumoj konigontaj al ni diversajn aspektojn de la vjetnama literaturo, malmulte konata de la mondo pro lingva baro. La Antologio estas kompilita kaj enkondukita de Nguyen Khac Vien, Nguyen Van Hoan kaj Huu Ngoc kaj tradukita de Dao Anh Kha kaj Nguyen Minh Kinh. La unua volumo kun pli ol 600 paĝoj en formato de 16×21 cm. estas dediĉita al la periodo de jarcentoj de la 10-a ĝis la 19-a kaj aperos ĉijare kun limigita eldonkvanto de 2,000 ekzempleroj. Ĝin baldaŭ sekvos la aliaj volumoj. Oni antaŭmendu ĝin ĉe VPEA, 68 Ly Thuong Kiet, Hanoj, VDR, kiu estas la sola distribuanto de la libro.

Raportante tiun novaĵon ni esprimas niajn sincerajn gratulojn kaj admiron al niaj vjetnamaj amikoj kaj deziras al ili novajn sukcesojn en la rekonstruado de ilia lando kaj en iliaj esperantaj laboroj.

## Aŭskultu

### Esp-an Disaŭdigon de Radio Pekino

**Por Eŭropo**

| | |
|---|---|
| **Pekina Tempo** | Sabato k Dimanĉo 4:00—4:30 |
| **GMT** | Vendredo k Sabato 20:00—20:30 |
| **Ondoj(m)** | 43 33 31 |

**Por Japanio, Koreio**

| | |
|---|---|
| **Pekina Tempo** | Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30 |
| **Ondoj(m)** | 47 40 |


**Por Sudorienta Azio**

| | |
|---|---|
| **Pekina Tempo** | Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00 |
| **Ondoj(m)** | 30 25 |

Caj Ĝenhua:

# Abeloj kaj Urso

(*Fablo*)



La abeloj laboras diligente kaj preparis multe da mielo.




Iutage alvenis urso kaj diris al ili: "Karaj amikoj, aglo kaj vulpo vin atakos! Tamen sciu, ke nur mi fortulo vin protektos."




La abeloj forte kortuŝiĝis de lia bonkoreco kaj lin regalis per sia frandaĵo.



Kiam la abeloj devis forflugi por kolekti nektaron, la urso petis ke li restu por gardi ilian hejmon.



Profitante tiun ŝancon la urso ekmanĝegis la laborfrukton de la abeloj kaj preskaŭ forkonsumis ĉion.



Kiam la abeloj revenis kaj vidis la fiagon de la hipokritulo, ili preskaŭ eksplodis de indigno.



Ili ĉiuj sin ĵetis al la urso kaj lin pikis tiel forte, ke la lasta forkuris en paniko.

*Sur la Kovrilo:*

Kiam la kunuletoj prezentas

*Sur la Dorskovrilo:*

Ruĝaj umefloroj




# EL POPOLA ĈINIO 中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**
**P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 2 (187) 1974**


## Ĉefa Enhavo


Kial la ĉinaj intelektaj gejunuloj devas iri en la kamparon? . . . 1

La scienca kaj teknika grupo de junuloj en Heheng-ĉeng-brigado . . . 9

Kultivi kinkonojn por la patrolando . . . 12

Heredigi la revolucian spiriton de penema lukto . . . 14

Vizito al Jejuan en aŭtunrikolta sezono . . . 16

La popola komunumo Ruĝa Flago . . . 21

Inter nova kaj malnova kadroj . . . 26

Giaŭ Ŝunfa en apliko de akupunkturo al kranihaŭto . . . 29

Kamparanino-pentristino (*Raportaĵo*) . . . 31

Harbino — fama urbo de nordorienta Ĉinio . . . 37

Amikeca kunligilo . . . 40

Ekspozicioj de fremdaj landoj en Pekino . . . 43

La tuj falonta naciperfida kliko de Lon Nol . . . 44

Li-nacieco . . . 46

La ĉinaj montaroj . . . 48

Eldona novaĵo el VDR . . . 54



Angulo de la hodiaŭa gubernia urbo Linkju

# Nova Fizionomio de Linkju



Gvidanto de la partia komitato de Linkju-gubernio interkonsiliĝas kun amasoj de Sitoŭ-komunumo pri plano de reformo de montoj kaj riveroj.

Linkju estas gubernio en Ŝandong-provinco de Ĉinio. Montetoj okupas 90 pocentojn de ĝia tuta areo. En la historio la loko estis ofte atakata de sekegeco kaj la laboranta popolo vivis en mizerego. En 1942 malsato kaŭzita de sekegeco forprenis la vivon de 380,000 homoj kaj 300,000 homoj migris aliloken por fari almozpeton.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio, la popolo de Linkju efektivigis agrikulturan kooperigon kaj popolkomunumigon. Apogante sur la forto de kolektivo la komunumanoj kaj kadroj konstruis unu post alia 760 diversajn akvorezervejojn, kies totala kapacito atingis 280,000,000 kubmetrojn, kaj fosis kanalojn kun totala longeco de pli ol 1,500 kilometroj. Dank' al tio 45 pocentoj de la agroj de la gubernio ricevas irigacion, kaj bonaj rikoltoj de greno estis akiritaj en sinsekvaj jaroj. Nun Linkju fariĝis pli prospera.






Komunumanoj hakas ŝtonojn por konstrui akvorezervejon.



Bona kresko de plantajoj dependas de la abunda akvo en la akvorezervejo Jejuan.



Klara akvo fluas en Kingŝi, la lokon antaŭe akvomankan.



La produkta brigado Ĝugiapo fosis apud la vilaĝo akvejon, kiu alportis grandan oportunon al la vilaĝanoj.



**Junaj gekomunumanoj de Fugialiĝaŭ-brigado**


La vojo, kiun antaŭe trairis la fuĝantaj kamparanoj, nun fariĝis ombra ŝoseo kaj sur ĝi galopas kamionoj plenŝarĝitaj per kokono.





Komunumaninoj de Jangŝan-komunumo ekzamenas novan specon de tritiko.

# Glazurita Ceramiko de Ĉinio



Glazuritaj ceramikaĵoj estas fortikaj, la koloroj estas belaj kaj longtempe konserveblaj. Post multaj jaroj la koloroj restas ankoraŭ same freŝaj kiel la novaj. La glazurita ceramiko estas antikva popola arto de nia lando kun aparta nacia stilo.

Glazurita ceramiko havas longan historion en Ĉinio. En Han-dinastio oni jam ekuzis la arton en fabrikado de fenestroj, pordoj, ekranoj kaj diversaj vazoj. Depost la 4-a jarcento p.K. la arto estis ekuzata en farado de tegoloj kaj ornamaĵoj de tegmentoj.

Post la Liberigo la tradicia tekniko de glazurita ceramiko estis plurpaŝe [illegible]. La glazuritaj ceramikaĵoj [illegible] sur la modernaj konstruaĵoj, ekzemple la Popola Halo, la [illegible] Palaco, la Pekina Fervoja Stacio, la Tutlanda Agrikultura Ekspozicio en Pekino [illegible] ceramikaĵoj des pli imponigis tiujn kons- [illegible] -senoj kaj variecoj senĉese renovi[illegible] [illegible]oj kaj aliaj bestoj, stabloj de [illegible]oj, gar[illegible] [illegible]rdenaj lanternoj k.a.







6621

世界语《中国报道》一九七四年第二期（本刊代号：二——九一五）